

BEK-Kurso NESPO

Nova **E**kzercaro pri **S**ufiksoj kaj **P**refiks**O**j

Verkita de Dennis Keefe (1981-2007)
Kontrollegita de Jorge Camacho (2007)



Jen Dennis Keefe en neserioza momento de la tre serioza, intensa BEK-Kurso sur la Esperanto-Insulo en 2010. Tiu libro en liaj manoj estas la eldonita papera versio de BEK-NESPO de 2007. La BEK-Kurso konsistas el 5 ĉefaj libroj, kaj multe da alia, aldona materialo. La plejparto de la BEK-Kurso estas EKZERCARO. BEK ne estas metodo. Oni povas instrui BEK per iu ajn metodo, sed prefere, ke la kursgvidanto ŝanĝu la metodon laŭ la ŝanĝanta nivelo de la gelernantoj, kaj, plej grave, miksu metodojn.

BEKkurso Vortstudo 1

Prefikso MAL-

<i>alta</i>	<i>bona</i>	<i>granda</i>	<i>longa</i>	<i>peza</i>	<i>profunda</i>
<i>malalta</i>	<i>malbona</i>	<i>malgranda</i>	<i>mallonga</i>	<i>malpeza</i>	<i>malprofunda</i>
<i>bela</i>	<i>facila</i>	<i>larĝa</i>	<i>mola</i>	<i>pura</i>	<i>varma</i>
<i>malbela</i>	<i>malfacila</i>	<i>mallarĝa</i>	<i>malmola</i>	<i>malpura</i>	<i>malvarma</i>

EKZERCO 1a: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 112.

Ne forgesu la retejon www.bekkurso.info kie troviĝas aliaj ekzemploj kaj ekzercoj.

1. Ĉinio estas g_____, sed Japanio estas m____g_____.
2. Esperanto estas relative f_____, sed la aliaj lingvoj estas pli m____f_____.
3. La Alpoj (montoj) estas tre a_____, kaj la valoj estas p_____.
4. Li lavis la manojn per varma akvo kaj sapo. Nun liaj manoj estas p_____.
5. Prenu la sapon, kaj lavu viajn manojn! Ili estas m____p_____.
6. Ĉe la norda poluso la aero estas tre m____v_____, sed en la dezerto Saharo, ĝi estas v_____.
7. Elefanto estas g_____. Abeloj kaj formikoj estas m____g_____.
8. Inter Eŭropo kaj Usono estas g_____ distanco – miloj kaj miloj da kilometroj.
9. Elefanto estas p_____. Kolibro estas m____p_____.
10. Metaloj ĝenerale estas m____m_____. Kotonaj kaj kaŭĉuko estas m_____.

Prinotu 1: pura aero, malpura aero, profunda akvo, rapida aviadilo, mola butero, altaj konstruaĵoj, malaltaj domoj, juna knabo kaj maljuna avo, malfacila laboro, malgranda lando, malfacilaj lingvoj, granda malfacilaĵo, malpuraj manoj, vasta maro, pezaj metaloj, altaj nuboj, peza pakaĵo, longaj riveroj, malmola ŝtono, larĝaj kaj longaj stratoj, varma supo, alta turo, profundaj valoj, malbona vetero. Ruĝaj tomatoj, flavaj bananoj, oranĝkoloraj fruktoj.

Prinotu 2: pura aero = aero pura, altaj montoj = montoj altaj, peza ŝtono = ŝtono peza. Normale oni metas la a-vorton antaŭhistoria la o-vorton.

Prinotu 3: La malo (kontraŭo) de nigra estas blanka.

-- Kio estas la malo de pura? -- Malpura.

-- Kio estas la malo de malfacila? -- Facila.

EKZERCO 1b : utiligu la vortojn de la antaŭa paĝo: granda, malgranda, peza, rapida, ktp. Vidu respondojn sur la paĝo 112.

1. Kia estas Londono? Ĝi estas g_____.
2. Kia estas Usono? Ĝi estas g_____.
3. Kiaj estas Portugalio kaj Svisio? Ili estas m___g_____.
4. Kiaj la Alpoj estas? Ili estas a_____.
5. Kaj la valoj de la Alpoj? Ili estas p_____.
6. Kia estas Esperanto? Ĝi estas relative f_____.
7. Kiaj estas abeloj, kaj formikoj kaj muŝoj? Ili estas m___g_____.
8. Kiaj estas Esperanto, kaj la angla kaj germana lingvoj? Esperanto estas relative f_____, kaj ĉi tiuj estas m___f_____.
9. Kia estas la monto Everesto? Ĝi estas a_____.
10. Kia estas la BEKkurso de Esperanto? Ĝi estas b_____. (Mi esperas!)
11. Kiaj estas ĉerizoj, bananoj kaj oranĝoj? Ĉerizoj estas r_____, kaj bananoj estas f_____, kaj oranĝoj estas o_____.
12. Kia estas la rivero Misisipo? Ĝi estas l_____ kaj l_____.
13. Kia estas la dezerto Saharo? Ĝi estas v_____.
14. Kiaj estas plumbo kaj aluminio? Plumbo estas p_____, kaj aluminio estas m___p_____.
15. Kiaj estas fero kaj ŝtalo? Ili estas m___m_____.
16. Rapida aŭ malrapida, kia estas aviadilo? Ĝi estas _____?
17. Kiaj estas someraj tagoj, kaj kiaj, vintraj tagoj? En Eŭropo, someraj tagoj estas v_____, kaj vintraj tagoj estas m___v_____.

BEKkurso Vortstudo 2

Adjektivoj pri personoj

bela
malbela
bona
malbona

dika
maldika
feliĉa
malfeliĉa

forta
malforta
inteligenta
malinteligenta

juna
maljuna
riĉa
malriĉa

EKZERCO 2a : utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 112.

1. Ŝi aĝas 99 jarojn. Ŝi estas tre m____j_____.
2. Paŭlo manĝas ĉion kaj ĉiam. Li pezas 150 kilogramojn. Li estas tre d_____.
3. Maria havas multe da mono kaj oro. Ŝi estas r_____.
4. Ĉiuj viroj amas Katarinan. Ŝi estas b_____.
5. Arnoldo havas grandajn muskolojn. Li estas f_____.
6. La sciencisto havas grandan cerbon. Li estas i_____.
7. Dionizio ne havas problemojn. Li estas tre f_____.
8. Henriko ne havas monon. Li estas m____r_____.
9. Ili studas la gramatikon de Esperanto diligente. Ili estas b_____ gelernantoj.
10. Dio estas b_____. La diablo estas m____b_____.
11. En multaj fabeloj, princino estas b_____, sed sorĉistino estas m____b_____.
12. Kiaj estas knaboj, kaj kiaj estas avoj? Ili estas j_____, kaj m____j_____ respektive..
13. Princino kaj sorĉistino—kiaj ili estas? Ili estas b_____, kaj m____b_____.

Prinotu: dika persono, dika libro, dika kiel porko, forta kiel leono, riĉa kiel bankisto, riĉa je scio kaj sperto, belaj vir(in)oj, bela pejzaĝo, bela tago, bela nokto, bela sed stulta, ktp.

EKZERCO 2b : utiligu la sekvajn vortojn: leono, turo, porko, kuniklo, ŝtono, bankisto, aero, plumbo, ŝnuro, testudo Vidu respondojn sur la paĝo 112.

- | | | |
|---------------------|-------------------------|---------------------|
| 1. forta kiel _____ | 4. malpeza kiel _____ | 7. dika kiel _____ |
| 2. riĉa kiel _____ | 5. rapida kiel _____ | 8. longa kiel _____ |
| 3. peza kiel _____ | 6. malrapida kiel _____ | 9. altaj kiel _____ |

BEKkurso Vortstudo 3

Ĉu vi legas kaj parolas Esperanton?

PAROLI:

Mi parolas la anglan lingvon.

= Mi parolas la anglan..

= Mi parolas angle.

Kiom da lingvoj vi scias (scipovas)?

Mi scias tri lingvojn: la anglan, la hispanan kaj Esperanton.

Kiel li parolas Esperanton?

Li parolas Esperanton tre bone kaj flue.

LEGI:

Mi legas libron, revuon, ĵurnalon, romanon, bonan libron, interesan romanon, francan ĵurnalon, esperantajn librojn, ktp.

Mi legas angle, france, germane, la hispanan lingvon, la japanan, en la ĉina, ktp. multe, malmulte, ofte, malofte, vespere, en lito, en biblioteko, rapide, ktp.

Mi rigardas televidon, filmon, interesan programon, anglan filmon en kinejo, ktp.

EKZERCO 3: utiligu la supraĵajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 112.

1. -- Ĉu vi parolas g_____?
-- Jes, mi parolas la _____.
2. Mi parolas la a_____. Mi parolas ankaŭ la f_____ kaj la g_____.
3. -- Kion vi legas?
-- Mi legas j_____ libron.
4. -- Ĉu vi parolas angle?
-- Jes, mi parolas la _____.
5. Li legas esperantajn librojn m_____ v_____.
6. Li estas Ruso. Li scipovas la _____.
7. Ili estas Hispanoj. Ili legas h_____ l_____.

BEKkurso Vortstudo 4

Kelkaj utilaj verboj por via kurso

<i>atenti</i>	<i>doni</i>	<i>koni</i>	<i>ludi</i>	<i>ricevi</i>	<i>skribi</i>
<i>aŭskulti</i>	<i>fari</i>	<i>kopii</i>	<i>memori</i>	<i>rigardi</i>	<i>studi</i>
<i>bezoni</i>	<i>farti</i>	<i>korespondi</i>	<i>nomiĝi</i>	<i>ripeti</i>	<i>surhavi</i>
<i>bonvoli</i>	<i>forgesi</i>	<i>legi</i>	<i>paroli</i>	<i>ripozi</i>	<i>surmeti</i>
<i>danki</i>	<i>havi</i>	<i>relegi</i>	<i>pensi</i>	<i>scii</i>	<i>traduki</i>
<i>demandi</i>	<i>instrui</i>	<i>lerni</i>	<i>rememori</i>	<i>scipovi</i>	<i>vidi</i>
<i>diveni</i>	<i>kompreni</i>	<i>loĝi</i>	<i>respondi</i>	<i>sendi</i>	<i>vivi</i>

Uzu vian vortaron, kaj lernu bone la esperantajn vortojn.

Multe el la ĉi subaj frazoj rekte rilatas al BEKunu de la BEKkurso, tamen vi povas fari la ekzercon sen BEK.

EKZERCO 4: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 112.

1. -- Kiel vi n_____?
-- Mi estas Maria.
2. B_____ doni al mi kafon kun sukero.
3. -- Ĉu vi k_____ Petron?
-- Jes, li estas mia bona hispana amiko.
4. Kie l_____ Vladimiro?
Lia domo estas dekstre de la apoteko sur la ĉefstrato.
5. Esperantistoj s_____ multe da poŝtkartoj al multaj landoj.
6. -- Kion vi f_____?
-- Mi skribas leteron al mia amikino Barbara.
7. Mi a_____ la radioelsendon en Esperanto de la Pola Radio.
8. -- Kiom da lingvoj vi s_____?
-- Mi parolas du. Mi legas tri.
9. La instruisto demandas, kaj la gelernantoj r_____.
10. Maria legas kaj r_____ la leterojn kaj poŝtkartojn de Viktoro, ŝia amikego.
11. Viktoro sendas leterojn al Esperantistoj en Ĉinio, kaj ili sendas leterojn al li. Ili
k_____.
12. Mia najbaro l_____ violonon por la orkestro de nia urbo.

13. Viktoro parolas, legas, kaj skribas Esperanton tre bone. Li s_____ tre bone Esperanton.
14. Viktoro s_____ la ĉinan lingvon en la Universitato de Varsovio.
15. La instruisto de Esperanto d_____, kaj la gelernantoj r_____.
16. En la BEKkurso, la gelernantoj faras la liston de demandoj, kaj ili r_____ ĝin (Prinotu: en la BEKkurso la gelernantoj faras la demandoliston dufoje).
17. La sciencisto p_____ pri matematiko silente en la brakseĝo.
18. Mi d_____ vin pro via letero. Refoje, koran dankon.
19. Henriko legas la grandan libron pri Don Kiĥoto. Sinjoro Diego, la hispana tradukisto, t_____ ĝin.
20. -- Ĉu vi konas la sinjoron ĉe la tablo?
-- Jes, sed mi ne m_____ lian nomon. Kiel li nomiĝas?
21. -- Kelnero: Jen via manĝaĵo kaj trinkaĵo.
-- Kliento: Mi d_____.
22. La ĉemizo de Ada estas blua. Kaj la ĉemizo de Ramono?
Li s_____ blankan ĉemizon.
23. Sinjoro Rodrigo estas tre riĉa. Li h_____ grandan domon, novan aŭtomobilon, kaj multe da mono en la banko.
24. Mipi kaj Mupi p_____ angle kaj esperante kune.
25. -- Mi ne k_____ la vorton.
-- Rigardu en la esperanta vortaro!
26. Eble vi ne konas la sencon de vorto. Ne gravas. D_____!
27. La aŭskultanto s_____ mesaĝon hieraŭ al retpoŝto de Pola Radio.
28. Mi f_____ la adreson de la tt-ejo de UEA (Universala Esperanta Asocio). Do mi serĉos ĝin sur la interreto.
29. -- Ĉu vi k_____ multe per interreto?
-- Jes, mi sendas kaj ricevas multe da mesaĝoj.
30. Lerne Esperanton rapide. L_____ la esperantajn revuojn, a_____ la esperantajn radioelsendojn, s_____ leterojn al Esperantistoj en Japanio kaj Ĉinio, kaj l_____ kun ni en la BEKkurso.

BEKkurso Vortstudo 5

Sufikso -IN

-o,	<i>Esperantisto</i>	<i>hundo</i>	<i>kato</i>	<i>nevo</i>	<i>viro</i>
-ino	<i>Esperantistino</i>	<i>hundino</i>	<i>katino</i>	<i>nevino</i>	<i>virino</i>
<i>amiko</i>	<i>filo</i>	<i>instruisto</i>	<i>kuzo</i>	<i>onklo</i>	<i>ktp</i>
<i>amikino</i>	<i>filino</i>	<i>instruistino</i>	<i>kuzino</i>	<i>onklino</i>	
<i>avo</i>	<i>frato</i>	<i>junulo</i>	<i>lernanto</i>	<i>patro</i>	
<i>avino</i>	<i>fratino</i>	<i>junulino</i>	<i>lernantino</i>	<i>patrino</i>	
<i>edzo</i>	<i>germano</i>	<i>knabo</i>	<i>nepo</i>	<i>sinjoro</i>	
<i>edzino</i>	<i>germanino</i>	<i>knabino</i>	<i>nepino</i>	<i>sinjorino</i>	

EKZERCO 5: utiligu vortojn kun la sufikso -in aŭ -o. Vidu respondojn sur la paĝo 112.

1. En la klasĉambro estas la instruisto, la l _____ kaj la l _____.
2. Johano estas okjara k _____, kaj Maria estas sepjara k _____.
3. Tiu letero estas por S _____ Zamenhof, kaj la alia letero estas por lia e _____.
4. TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) havas anojn (membrojn). Tiuj membroj estas j _____ kaj j _____.
5. Jen la filo de mia onklo, mia k _____. Kaj jen la filino de mia onklo, mia k _____.
6. Bonan tagon al vi, karaj E _____ kaj E _____.
7. Johano amas la v _____, kaj Maria amas la v _____.
8. Katoj kaj katinoj. Hundoj kaj h _____.
9. Avo kaj a _____. Nepo kaj n _____.
10. Sinjoro Schmidt estas germano, kaj lia edzino estas g _____.

BEKkurso Vortstudo 6

Prefikso GE-

geknaboj estas knabo kaj knabino	<i>avo</i>	<i>avino</i>	<i>geavoj</i>
	<i>edzo</i>	<i>edzino</i>	<i>geedzoj</i>
	<i>esperantisto</i>	<i>esperantistino</i>	<i>geesperantistoj</i>
	<i>filo</i>	<i>filino</i>	<i>gefiloj</i>
	<i>frato</i>	<i>fratino</i>	<i>gefratoj</i>
	<i>instruisto</i>	<i>instruistino</i>	<i>geinstruistoj</i>
	<i>junulo</i>	<i>junulino</i>	<i>gejunuloj</i>
	<i>knabo</i>	<i>knabino</i>	<i>geknaboj</i>
	<i>kursano</i>	<i>kursanino</i>	<i>gekursanoj</i>
	<i>kuzo</i>	<i>kuzino</i>	<i>gekuzoj</i>
	<i>lernanto</i>	<i>lernantino</i>	<i>gelernantoj</i>
	<i>nepo</i>	<i>nepino</i>	<i>genepoj</i>
	<i>onklo</i>	<i>onklino</i>	<i>geonkloj</i>
	<i>patro</i>	<i>patrino</i>	<i>gepatroj</i>
	<i>sinjoro</i>	<i>sinjorino</i>	<i>gesinjoroj</i>

EKZERCO 6: utiligu la supraĵn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 112.

1. Estas 20 g__l_____ en la kurso de Esperanto: 10 lernantoj kaj 10 _____.
2. En la familio estas du gefiloj. La _____ nomiĝas Maria, kaj la f_____ nomiĝas Nikolo.
3. La lingvo de via patro kaj de via patrino estas via g__p_____ lingvo.
4. En la elementa lernejo estas inter 15 kaj 40 g__k_____ en unu klasĉambro.
5. Karaj g__e_____, estu bonvenaj al nia Kongreso de Esperanto!
6. La avo kaj avino amas la g__n_____ tre.
7. La frato de mia patro estas mia o_____, kaj la fratino de mia patro estas mia o_____.
8. Je la oka vespere, miaj g__f_____ kaj miaj g__p_____ estas hejme.
9. La tuta familio: la g__a_____, la g__p_____ kaj la g__f_____ manĝis kune.
10. Ĉu vi konas niajn novajn najbarojn: g__s_____ González el Hispanio?

BEKkurso Vortstudo 7

objektoj en la klasejo de Esperanto

- Oni uzas skribilojn: *krajono, globkrajono, feltkrajono, kreto*
 - Oni skribas sur, en: *papero, kajero, nigra tabulo, blanka tabulo*
 - Estas multaj personoj en la kurso: *instruisto (kursgvidanto), instruistino, gelernantoj*
 - En la lernoĉambro estas: *muro, planko, plafono, fenestro, pordo*
 - Estas ankaŭ mebloj: *seĝo, tablo, pupitro, benko, skribotablo*
 - Troviĝas ankaŭ: *forviŝilo, afiŝo, bildo, desegnaĵo, komputilo, printilo, projekciilo*
 - Aliaj utilaj vortoj: *kurso, leciono, paŭzo, ekzameno, hejmtasko, lernolibro, demando, respondo, eraro, vorto, vortaro, litero, gramatiko*
-

Legu la sekvan tekston

La gelernantoj skribas per krajonoj kaj globkrajonoj. La instruisto kaj instruistino skribas per kreto. La instruisto skribas sur la nigra tabulo per kreto. La instruistino skribas sur la blanka tabulo per feltkrajono. La lernantino skribas la novajn vortojn sur papero aŭ en la kajero. La instruistino staras apud la skribotablo, kaj la gelernantoj sidas sur seĝoj aŭ benkoj. La seĝoj en la lernoĉambro estas ĉirkaŭ la tabloj. Sur la kvar muroj de la lernoĉambro estas koloraj afiŝoj, kaj bildoj kun la desegnaĵoj de la BEKkurso. Nia lernoĉambro havas du pordojn kaj kvin fenestrojn. La instruistino faras demandojn al la gelernantoj, kaj ili faras respondojn al la instruistino. Paŭlo ne konas la vorton “kursgvidanto.” Li prenas vortaron. Li malfermas ĝin. Li serĉas la vorton. Li trovas ĝin. Li kontrolas la sencon. Nun li konas la vorton “kursgvidanto.” “Kursgvidanto signifas “instruisto.” La kursgvidanto skribas “Bonan *tagon*.” Li faras eraron. Li forviŝas la literon “d” per forviŝilo. Li reskribas la literon “t.” En moderna klasĉambro la instruisto uzas komputilon kaj projekciilon.

EKZERCO 7: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 113.

1. La gelernantoj skribas per k_____ kaj g_____.
2. La instruisto aŭ instruistino skribas per blanka k_____.
3. La instruisto skribas sur la n_____ t_____ per kreto.
4. La instruisto skribas sur la blanka tabulo per blua f_____.
5. La lernanto skribas la novajn vortojn sur p_____ aŭ en la k_____.
6. La instruistino staras apud la s_____, kaj la gelernantoj sidas sur la s_____ aŭ b_____.

7. La seĝoj en la lernoĉambro estas ĉirkaŭ la t_____.
 8. Sur la kvar muroj de la lernoĉambro estas koloraj a_____, kaj bildoj kun la d_____ de la BEKkurso.
 9. Nia lernoĉambro havas du p_____ kaj kvin f_____.
 10. La instruistino d_____ de la gelernantoj, kaj ili donas r_____ al la instruistino.
 11. Paŭlo ne konas la vorton “kursgvidanto.” Li prenas vortaron. Li malfermas ĝin. Li s_____ la vorton. Li t_____ ĝin. Li k_____ la sencon. Nun li konas la vorton “kursgvidanto.” “Kursgvidanto” signifas “instruiston.”
 12. La kursgvidanto skribas “Bonan *dagon*.” Li faras e_____. Li f_____ la literon “d” per forviŝilo. Li reskribas la literon “t.”
 13. Vi estas en la centro de lernoĉambro. Super vi estas la p_____. Sub vi estas la p_____. Ĉirkaŭ vi estas kvar m_____.
 14. Dum la leciono vi lernas novan g_____ kaj novajn v_____.
 15. Vi skribas la vortojn en k_____.
 16. Vi eniras en la klasĉambron. Vi sidiĝas sur b_____, aŭ sur s_____.
 17. Vi aŭskultas la instruistino. Ŝi d_____ al vi, kaj vi r_____ al ŝi.
 18. La instruistino estas apud la nigra tabulo. En la mano ŝi havas k_____ kaj f_____.
 19. Sur la muroj de la klasĉambro estas a_____, b_____ kaj d_____.
 20. En moderna klasĉambro la instruisto uzas k_____ kaj p_____.
-

Ĉu vi povas priskribi tagon en lernejo? Ekzemple:

Mi iras al mia lernejo. Mi eniras la klasĉambron. Mi metas mian libron sur la pupitron. Mi sidiĝas. Mi diras “bonan tagon” al mia instruistino. Ŝi skribas vortojn sur la tabulo. Mi notas ilin en mia kajero. Ŝi demandas al mi kaj al la aliaj gelernantoj. Kelkfoje ni eraras. Ŝi helpas nin. Kutime mi respondas bone. Mi estas bona lernanto. Post la leciono ni havas paŭzon. Ni eliras kaj ludas ekster la lernejo. Poste ni uzas komputilojn. Ni lernas multe. Ni ankaŭ multe legas. Poste ni iras hejmen. Ni estas kontentaj, sed tre lacaj.

BEKkurso Vortstudo 8

Kion oni faras dum la leciono?

<i>atenti</i>	<i>forgesi</i>	<i>koni</i>	<i>literumi</i>	<i>rigardi</i>
<i>aŭskulti</i>	<i>forviŝi</i>	<i>kontroli</i>	<i>memori</i>	<i>signifi</i>
<i>demandi</i>	<i>havi</i>	<i>kopii</i>	<i>paroli</i>	<i>skribi</i>
<i>desegni</i>	<i>helpi</i>	<i>korekti</i>	<i>prononci</i>	<i>traduki</i>
<i>disdoni</i>	<i>instrui</i>	<i>legi</i>	<i>reskribi</i>	<i>uzi</i>
<i>erari</i>	<i>klarigi</i>	<i>lerni</i>	<i>respondi</i>	<i>vidi</i>

Legu la sekvajn ekzemplojn:

1. La kursgvidantoj *instruas* bone. La gelernantoj *lernas* rapide.
2. La instruisto *klarigas* la gramatikon. La gelernantoj *kopias* la novajn gramatikajn regulojn en la kajerojn.
3. Sur la bildo la instruisto *desegnas* libron kaj Pablon (en BEKunu). Pablo *legas* la libron. La nomo de la libro estas “Don Kihoto.”
4. La instruisto *parolas* pri la historio de Esperanto. La gelernantoj *aŭskultas* atente.
5. La lernanto ne *kopias* bone la vorton. Li *eraras*. Li trovas la eraron kaj *forviŝas* ĝin. Li *reskribas* la vorton.
6. La lernantoj *eraras* pri la gramatiko. La instruisto *korektas* la erarojn.
7. Teodoro *parolas* tre bone. Li havas bonan akĉenton de Esperanto. Li *prononcas* la vortojn bone.
8. La gelernantoj ne *konas* la vorton “forviŝilo.” Ili *kontrolas* la sencon de la vorto en la vortaro.
9. Mi ne plu *memoras* la sencon de la vorto. Mi *forgesis* ĝin.
10. La kursgvidanto *tradukas* la vorton “vortaro” en la anglan lingvon. Li diras, “En la angla lingvo “vortaro” *signifas* 'dictionary'.”
11. La instruistino havas la ekzamenetojn. Ŝi *disdonas* ilin. Nun la gelernantoj havas la ekzamenetojn.
12. La instruisto *demandas* pri la gramatiko de Esperanto. La gelernantoj *respondas* bone al la demandoj.
13. La instruisto *parolas* pri Mipi kaj Mupi (du etuloj de BEKunu). La gelernantoj

aŭskultas lin.

EKZERCO 8: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 113.

1. La kursgvidanto instruas bone. La gelernantoj l_____ rapide.
2. La instruistino k_____ la gramatikon. La gelernantoj kopias la novajn gramatikajn regulojn en la kajeroj.
3. Sur la bildo la instruisto d_____ libron kaj Pablon. Pablo legas la libron. La nomo de la libro estas Don Kihoto. (el BEKunu en la BEKkurso)
4. La instruisto parolas pri la historio de Esperanto. La gelernantoj a_____ atente.
5. La lernanto ne kopias bone la vorton. Li e_____. Li trovas la eraron kaj f_____ ĝin.
6. La lernantoj eraras pri la gramatiko. La instruistino k_____ la erarojn.
7. Teodoro parolas tre bone. Li havas bonan akĉenton. Li p_____ la vortojn bone.
8. La gelernantoj ne konas la vorton “forviŝilo.” Ili k_____ la sencon en la vortaro.
9. Mi ne plu memoras la sencon de la vorto. Mi f_____ ĝin.
10. La kursgvidanto tradukas la vorton “vortaro” en la anglan lingvon. Li diras, “En la angla lingvo “vortaro” s_____ 'dictionary'.”
11. La instruistino havas la ekzamenetojn. Ŝi d_____ ilin. Nun la gelernantoj havas la ekzamenetojn.
12. La instruisto demandas pri la gramatiko de Esperanto. La gelernantoj r_____ bone al la demandoj.
13. La instruisto p_____ pri Mipi kaj Mupi. La gelernantoj aŭskultas lin.

Prinotu: lerni multe, aŭskulti atente, bele desegni, prononci klare, klarigi koncepton, klarigi sencon de vorto, ofte aŭ malofte erari, forviŝi per forviŝilo, disdoni paperojn al la gelernantoj, paroli france kaj esperante, memori kaj forgesi, rapide respondi al demandoj, korekti eraron, fari eraron, bone lerni, uzi komputilon kaj printilon, ktp.

BEKkurso Vortstudo 9

sufikso kaj nombroj -ONO

1 unu	1a unua	11 dek unu	1/2 duono
2 du	2a dua	17 dek sep	1/3 triono
3 tri	3a tria	21 dudek unu	1/4 kvarono
4 kvar	4a kvara	48 kvardek ok	1/10 dekonono
5 kvin	5a kvina	93 naŭdek tri	1/20 dudekonono
6 ses	6a sesa	100 cent	2/3 du trionoj
7 sep	7a sepa	237 ducent tridek sep	4/5 kvar kvinonaj
8 ok	8a oka	1,000 mil	3/100 tri centonoj
9 naŭ	9a naŭa	1,000,000 unu miliono	18/1,000 dekok milionoj
10 dek	10a deka	1,000,003 unu miliono tri	2/1,000,000 du miliononoj

EKZERCO 9a: utiligu la nombrojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 113.

- | | | |
|------------------|------------------|--------------------|
| 1. <u>du</u> = 2 | 11. _____ = 135 | 21. _____ = 1/2 |
| 2. _____ = 4 | 12. _____ = 185 | 22. _____ = 1/4 |
| 3. _____ = 10 | 13. _____ = 200 | 23. _____ = 3/4 |
| 4. _____ = 15 | 14. _____ = 298 | 24. _____ = 7/8 |
| 5. _____ = 19 | 15. _____ = 412 | 25. _____ = 1/100 |
| 6. _____ = 25 | 16. _____ = 841 | 26. _____ = 19/200 |
| 7. _____ = 49 | 17. _____ = 1000 | 27. _____ = 5/100 |
| 8. _____ = 77 | 18. _____ = 1234 | 28. _____ = 3482 |
| 9. _____ = 100 | 19. _____ = 2432 | 29. _____ = 5554 |
| 10. _____ = 115 | 20. _____ = 9999 | 30. _____ = 8003 |

EKZERCO 9b: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj.

1. Januaro estas la _____ monato de la jaro.
2. Februaro estas la _____.
3. Tri estas la _____ de ses.
4. Kvar estas la _____ de dekdu.

5. La _____ kaj _____ monatoj de la jaro estas junio kaj julio.
 6. La _____ de 200 estas 100.
 7. En Eŭropo, ĵaŭdo estas la _____ labortago de la semajno, kaj vendredo estas la _____.
 8. _____ de 30 estas 20.
 9. Septembro estas la _____ monato de la jaro.
 10. Novembro kaj decembro estas la _____ kaj la _____ monatoj de la jaro.
 11. _____ de 100 estas 3.
 12. Ni estas sur la _____ paĝo de la BEKkurso.
 13. La nuna jaro estas _____. (2007)
 14. La venonta jaro estos _____.
 15. Ni estas en la _____ jarcento, kaj la _____ jarmilo.
-

BEKkurso Vortstudo 10

Sep gravaj prepozicioj

ĝis	=>	<i>ĝis la revido, ĝis la reaŭdo, ĝis reskribo, ĝis morgaŭ, ĝis postmorgaŭ, ĝis lunde, ĝis decembre, ĝis la venonta semajno, ktp.</i>
da	=>	<i>kiom da, multe da, malmulte da, taso da, glaso da, botelo da, kulero da, sufiĉe da, nesufiĉe da, miloj da ili, ktp.</i>
kun	=>	<i>parolas kun, estas kun, loĝas kun, sidas kun, staras kun, manĝas kun, trinkas kun, kafo kun lakto, teo kun sukero, teo kun citrono, ktp.</i>
per	=>	<i>per skribilo, per kreto, per globkrajono, skribmaŝino, komputilo, printilo, fotokopiilo, faksilo, telefono, tramo, buso, aviadilo, trajno, metroo, aŭto, bona metodo de Esperanto, la Valencia Metodo, ktp.</i>
pri	=>	<i>pensas pri matematiko, historio, la familio, amiko, amikino, libro pri la historio de Esperanto, prelego pri scienco, prelego pri Doktoro Zamenhof, demandas pri, ktp.</i>
por	=>	<i>bona por la sano, malbona por la sano, letero por vi, poŝtkarto por mia edzino, lecionoj pri gramatiko por la gelernantoj, bona ideo por vi, BEKkurso por la komencantoj, pakaĵo por vi, nenio por vi, ktp.</i>
dum	=>	<i>dum la tago, dum la nokto, dum la mateno, dummatene, dum niaj ferioj, dum la leciono de Esperanto, dum la somero, dum la vojaĝo, ktp.</i>

EKZERCO 10: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. (el BEKunu en la BEKkurso) Vidu respondojn sur la paĝo 113.

1. La sciencisto pensas _____ matematiko.
2. Ramono skribas _____ granda, longa skribilo.
3. Ĉu Sinjoro Nopo mortigas la muŝojn _____ libro, aŭ _____ muŝbatilo?
4. La ebriulo ne trinkas botelon _____ biero. Li trinkas botelon _____ ruĝa vino.
5. Ĉu vi trinkas multe _____ kafo por via matenmanĝo?
6. Li ne trinkas kafon sen lakto. Li trinkas kafon _____ lakto.
7. _____ la revido!
8. Ĉu vi venas al nia leciono kutime _____ aŭtobuso?

9. Kiom _____ personoj loĝas en Madrido?
10. Cigaredoj ne estas bonaj _____ via sano.
11. La bruna libro sur la tablo temas _____ la historio de Eŭropo.
12. Kion faras la gelernantoj _____ la leciono de Esperanto?
13. _____ morgaŭ!
14. La sekretariino ne plu skribas _____ elektra skribmaŝino. Ŝi uzas komputilon.
15. Ĉu la letero estas _____ li aŭ por ŝi?
16. Maria sidas kutime _____ Johano _____ la leciono de Esperanto.
17. Bonvolu doni al mi varman tason _____ teo.
18. _____ la leciono la instruisto ofte parolas _____ gramatiko.
19. Ĉu estas sufiĉe _____ pano _____ la tagmanĝo?
20. _____ la lunda leciono de Esperanto!
21. En Germanio multe _____ studentoj iras al la universitato _____ biciklo.
22. Freŝaj fruktoj kaj legomoj estas bonaj _____ vi.
23. Kion vi pensas _____ la internacia lingvo Esperanto?
24. Ĉu vi ofte manĝas _____ viaj geamikoj en restoracio?
25. Mi dormas _____ la nokto, kaj laboras _____ la tago.
26. La prezidento de Usono parolis _____ la ĉefministro de Britio en Vaŝingtono.
27. Estas tri retmesaĝoj sur la komputilo _____ vi.
28. Mi sendos la aliĝilon por la Kongreso de Esperanto _____ faksilo.
29. Estas multe da laboro. Ni devas labori _____ la fino de la tago.
30. Vi povas pagi la fakturon _____ eŭroj aŭ _____ dolaroj.
31. _____ kio temas tiu libro? biologio, kemio, aŭ fiziko?
32. Nia urbo faris novan ludlokon _____ la infanoj.
33. Niaj infanoj ludis multe ekster la domo _____ la ferioj.
34. Hieraŭ nia tuta familio manĝis _____ niaj geavoj por Kristnasko.

Prinotu: Ili parolis kune. Ili manĝis kune. *Por kiu* estas la telefonmesaĝo? *Per kiu* oni manĝas supon? *Kun kiuj* vi venis hieraŭ? *Pri kio* la profesoro prelegis? *Ĝis kiu* dato vi restos en en nia urbo? Ktp.

BEKkurso Vortstudo 11

Sufikso -EG

<i>ami</i>	<i>domego</i>	<i>inteligenta</i>	<i>malfortega</i>	<i>profunda</i>	<i>timegi</i>
<i>amegi</i>	<i>facila</i>	<i>inteligentega</i>	<i>manĝi</i>	<i>profundega</i>	<i>tre</i>
<i>bela</i>	<i>facilega</i>	<i>labori</i>	<i>manĝegi</i>	<i>rapide</i>	<i>treege</i>
<i>belega</i>	<i>forta</i>	<i>laboregi</i>	<i>monto</i>	<i>rapidege</i>	<i>trinki</i>
<i>bona</i>	<i>fortega</i>	<i>laŭte</i>	<i>montego</i>	<i>riĉa</i>	<i>trinkegi</i>
<i>bonega</i>	<i>fumi</i>	<i>laŭtege</i>	<i>multe</i>	<i>riĉega</i>	<i>urbo</i>
<i>bone</i>	<i>fumegi</i>	<i>longa</i>	<i>multege</i>	<i>ridi</i>	<i>urbego</i>
<i>bonege</i>	<i>granda</i>	<i>longega</i>	<i>nigra</i>	<i>ridegi</i>	<i>varma</i>
<i>bruo</i>	<i>grandega</i>	<i>malfacila</i>	<i>nigrega</i>	<i>ŝviti</i>	<i>varmega</i>
<i>bruego</i>	<i>hundo</i>	<i>malfacilega</i>	<i>ofte</i>	<i>ŝvitegi</i>	
<i>domo</i>	<i>hundego</i>	<i>malforta</i>	<i>oftege</i>	<i>timi</i>	

EKZERCO 11a. Vidu respondojn sur la paĝo 113.

1. Novjorko ne estas malgranda. Ĝi estas u_____.
2. Gustumu la ĉerizojn kaj la fragojn kaj la prunojn. Ili estas b_____.
3. Ŝi havas multe da mono. Ŝi estas r_____.
4. Leono havas grandajn muskolojn. Ĝi estas f_____.
5. La loĝejo de Aida havas 10 ĉambrojn. Aida posedas d_____.
6. Maria legas tre multe da libroj. Ŝi legas m_____.
7. Elizabeta plaĉas multe al viroj. Ŝi estas b_____.
8. Flora fartas tre, tre, tre bone. Li fartas b_____.
9. Ni lernas Esperanton tre rapide. Ĝi estas f_____ lingvo.
10. Ne estas nek luno nek steloj en la ĉielo. Estas n_____ nokto.
11. La suno brilas multe, kaj vento ne blovas. Homoj ŝvitas. Estas v_____ tago.
12. La montoj estas tre altaj, kaj la valo estas p_____.
13. Rikardo fumas cent cigaredojn ĉiutage. Li f_____.
14. Sur la strato estas laŭtaj kamionoj kaj motorcikloj. Estas b_____ sur la strato.
15. Por la tagmanĝo Andreo havis du kokinojn kaj grandan ŝafajon. Li m_____.
16. La monto Everesto estas a_____.
17. La riveroj Misisipo en Usono kaj Nilo en Egiptio estas l_____.
18. La geniulo Alfred Einstein estis i_____.

Prinotu:

urbo, urba trafiko, granda hundo, malgranda sed komforta domo, alta monto, altaj montoj, laŭta bruo, facila lingvo, fortega leono, nigraj hundoj, grandega domo, profunda valo, varmega kafo, malvarma tago en vintro, varmaj tagoj en somero, malfacila gramatiko, riĉa reĝo, forta leono kaj malforta muso, bela princ(in)o, malbela sorĉist(in)o, longaj stratoj kaj mallongaj stratoj en Parizo, inteligentaj studentoj, ofte trinki kafon kaj malofte teon, veni tre ofte, forta lumo ĝenas, bezoni helpon, manĝi panon kaj buteron, labori inter lundo kaj vendredo, mia kapo doloras, vi tre bone parolas, deziri glason da akvo, ŝi amas lin, timi araneojn.

EKZERCO 11b : utiligu vortojn el supre. Vidu respondojn sur la paĝo 113.

1. Kia estas la monto? Ĝi estas a _____.
 2. Kiaj estas leono kaj muso? La leono estas f _____, kaj la muso estas m _____ f _____.
 3. Kiel li parolas? Li parolas b _____.
 4. Kio ĝenas? La f _____ lumo ĝenas.
 5. Kiaj estas la princino kaj la sorĉistino? La princino estas b _____, kaj la sorĉistino estas m _____ b _____.
 6. Kion vi deziras? Mi deziras g _____ da a _____.
 7. Kion Maria timas? Ŝi timas a _____.
 8. Kiaj estas la stratoj de Parizo? Ili estas l _____ kaj m _____ l _____.
 9. Kaj la domo? Kia ĝi estas? La domo estas m _____ g _____ sed k _____.
 10. Kia estas la lingvo Esperanto? Ĝi estas f _____.
 11. Kiaj estas la tagoj en vintro kaj somero? La tagoj en vintro estas m _____ v _____, kaj la tagoj en somero estas v _____.
 12. Kiun ŝi amas? Ŝi amas l _____.
 13. Kiel li dormas? Li dormas p _____.
-

BEKkurso Vortstudo 12

Sufikso -ET

<i>arbo</i>	<i>iom</i>	<i>manĝi</i>	<i>strato</i>
<i>arbeto</i>	<i>iomete</i>	<i>manĝeti</i>	<i>strateto</i>
<i>bela</i>	<i>kato</i>	<i>monto</i>	<i>trinki</i>
<i>beleta</i>	<i>kateto</i>	<i>monteto</i>	<i>trinketi</i>
<i>blua</i>	<i>kulero</i>	<i>pluvi</i>	<i>urbo</i>
<i>blueta</i>	<i>kulereto</i>	<i>pluveti</i>	<i>urbeto</i>
<i>domo</i>	<i>lago</i>	<i>ridi</i>	<i>varma</i>
<i>dometo</i>	<i>lageto</i>	<i>rideti</i>	<i>varmeta</i>
<i>hundo</i>	<i>lito</i>	<i>ruĝa</i>	<i>verda</i>
<i>hundeto</i>	<i>liteto</i>	<i>ruĝeta</i>	<i>verdeta</i>

EKZERCO 12: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 114.

1. Nia kato estas juna. Ĝi estas k_____.
2. Por la tagmanĝo Luiza havas nur unu pomon kaj unu oranĝon. Luiza m_____.
3. Alia nomo por malgranda urbo estas u_____.
4. -- Ĉu vi deziras trinki multe da vino?
-- Ne, donu al mi nur i_____.
5. En Svisio estas grandegaj montoj. En Anglio estas nur m_____.
6. La veterprognozo por hodiaŭ: En Hispanio, Grekio kaj Italio estos tre varme. Sed en Francio kaj Germanio estos nur v_____e.
7. La gereĝoj loĝas en luksa kastelo. La popolo, aliflanke, loĝas en malgrandaj, simplaj d_____.
8. En la alta montaro troviĝas vilaĝoj kaj u_____.
9. -- Ĉu pluvos multe morgaŭ?
-- Ne, ne multe. Nur p_____.

Prinotu: lageto = malgranda lago = eta lago = lago kun malmulte da akvo, ktp.

Manĝeti = manĝi iomete = manĝi malmulte, manĝi kiel malgranda birdo, ktp.

Prinotu ankaŭ: trankvila urbeto, ridi laŭte, rideto bela, verdeta kamparo, blueta ĉielo, dometoj ĉirkaŭ lageto, dometo kun malgranda ĝardeno, beletaj knab(in)oj, eta urbo, etaj urboj, liteto por bebo, varmeta tago, persono kun rideto, manĝeti inter la manĝoj, ktp.

BEKumaĵoj I

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 114.

mal, in, ge, eg, et

1. gelnantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = tre malgranda domo
3. avino => geavoj = avo kaj _____ .
4. _____ = tre granda rivero
5. _____ = tute ne alta
6. _____ = tre peza ŝtono
7. _____ => filo kaj filino = _____
8. _____ = granda leono
9. _____ = dikega kato
10. _____ = malalta ĝirafo
11. _____ = malgranda kato
12. _____ = la malo de larĝa
13. _____ = pluvi tre malmulte
14. _____ = la kontraŭo de malpeza
15. _____ => Kiel bela vetero! La vetero estas _____ .
16. _____ = ina bovo
17. _____ = patro kaj patrino
18. _____ = tre altaj montoj
19. _____ = tre rapide
20. _____ = tre malrapide
21. _____ = ridi laŭte
22. _____ = mallonga kaj mallarĝa strato
23. _____ = inaj hundoj
24. _____ = tute ne facila
25. _____ = iomete blua

BEKkurso Vortstudo 13

Sufikso -IL

<i>aboni</i>	<i>forviŝi</i>	<i>komputi</i>	<i>pafi</i>	<i>ŝlosi</i>
<i>abonilo</i>	<i>forviŝilo</i>	<i>komputilo</i>	<i>pafililo</i>	<i>ŝlosilo</i>
<i>aviadi</i>	<i>fosi</i>	<i>kudri</i>	<i>printi</i>	<i>televيدي</i>
<i>aviadilo</i>	<i>fosilo</i>	<i>kudrilo</i>	<i>printilo</i>	<i>televيديلو</i>
<i>bati</i>	<i>haki</i>	<i>ludi</i>	<i>segi</i>	<i>tondi</i>
<i>batilo</i>	<i>hakilo</i>	<i>ludilo</i>	<i>segilo</i>	<i>tondilo</i>
<i>fajfi</i>	<i>informi</i>	<i>manĝi</i>	<i>serĉi</i>	<i>tranĉi</i>
<i>fajfilo</i>	<i>informilo</i>	<i>manĝilo</i>	<i>serĉilo</i>	<i>tranĉilo</i>
<i>faksi</i>	<i>kalkuli</i>	<i>mendi</i>	<i>skribi</i>	<i>veturi</i>
<i>faksilo</i>	<i>kalkulilo</i>	<i>mendilo</i>	<i>skribilo</i>	<i>veturilo</i>
<i>flugi</i>	<i>kombi</i>	<i>naĝi</i>	<i>sonori</i>	<i>voĉdoni</i>
<i>flugilo</i>	<i>kombilo</i>	<i>naĝilo</i>	<i>sonorilo</i>	<i>voĉdonilo</i>

EKZERCO 13a: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 114.

- En la venonta monato ni flugos de Londono ĝis Novjorko per usona a_____.
- Hartondisto tondas la hararon per t_____.
- Por la manĝoj Eŭropanoj uzas kuleron, forkon kaj t_____.
- Oni povas kalkuli rapide per k_____, sed oni ne povas skribi per ĝi.
- Per k_____, oni povas skribi, kalkuli kaj komputi.
- Forko, kulero, tranĉilo, glaso kaj telero estas ekzemploj de m_____.
- Sinjoro Nopo batas la muŝojn per _____. Kelkaj mortas, kaj kelkaj forflugas.
- Ĉu vi iros al la centro de la urbo per buso, aŭ ĉu vi iros per via v_____?
- Globkrajono, krajono kaj kreto estas s_____.
- Ĉu vi legis la bultenon de la loka grupo de Esperanto? Ĉu vi legis la _____?
- La ĉasistoj estas en la arbaro. Ili havas p_____, kaj atendas birdojn.
- La infanoj ŝatas ludi kun la l_____.
- Por voĉdoni por la propono, uzu la v_____.
- Por abonon esperantan revuon, skribu ĉekon kaj sendu la a_____.
- Mi perdis la butonon de mia ĉemizo. Kie estas la fadenon kaj k_____?
- Kaj birdoj kaj aviadiloj havas po du f_____.
- La profesoro eraris sur la nigra tabulo. Li nun serĉas la f_____.

18. El la branĉoj de la arboj Teodoro faras pecojn de ligno per s_____.
 19. Por trovi ion en la interreto, vi povas uzi la s_____ Google (Guglo).
 20. Li ŝlosis la pordon. Neniu povas eniri nun la domon. Li faris tion per s_____.
 21. Se vi volas aboni la revuon Esperanton, sendu la a_____ kun ĉeko, aŭ pagi per kreditkarto.
 22. Li hakis la malgrandan arbon. La arbo falis. Li faris tion per h_____.
 23. Fiŝoj, kompreneble, ne havas brakojn kaj krurojn. Ili havas n_____.
 24. Je la dekdua ni aŭdis la s_____ de la alta turo de la preĝejo. Ili estis belaj.
 25. Mi legis la artikolon sur la ekrano de mia komputilo. Poste mi volis legi ĝin surpapere, do mi uzis mian komputilan p_____.
-

Prinotu:

- Skribilo, forviŝilo kaj segilo estas iloj. Ankaŭ martelo, tenajlo kaj maleo estas iloj. Ankaŭ aparatoj, maŝinoj kaj instrumentoj estas iloj.
 - Grupo da iloj estas ilaro.
 - Kio estas ilego? Ĝi estas granda ilo. Kio estas ileto? Ĝi estas malgranda ilo.
 - Instrumento por skribi estas skribilo. Ilo por haki estas hakilo. Instrumento por fajfi nomiĝas fajfilo, ktp.
-

EKZERCO 13b: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 114.

1. *Granda ilo estas i_____.*
2. *Malgranda ilo estas i_____.*
3. *Ilo por haki estas h_____.*
4. *Instrumento por fajfi estas f_____.*
5. *Grupo da iloj estas i_____.*
6. *Aparatoj, maŝinoj kaj instrumentoj estas i_____.*
7. *Aparato por komputi estas k_____, kaj aparato por kalkuli estas _____.*

BEKkurso Vortstudo 14

tempaj esprimoj

HORO: *je la unua horo, je la dua, je la tria, je la deka, je la dekdua, ktp*

HORO kaj MINUTO: *je la unua horo kaj kvin minutoj, je la kvara kaj dudek kvin minutoj, 10 minutoj antaŭ la unua, dekkvin minutoj post la tria, je la deka precize, ktp*

TAGOJ: *lundo (lunde, lundon), mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo*

MONATOJ: *en januaro (januare, januaron), februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro, decembro*

TEMP-ESPRIMOJ: *matene (en la mateno, dum la mateno, matenon, ktp), fru-matene, antaŭtagmeze, post-tagmeze, vespere, tage, nokte, frue, malfrue, ktp.*

Pluraj ekzemploj:

1. La nova filmo estos lunde je la oka vespere.
2. Mi iras al mia leciono de piano je la sepa kaj duono marde vespere.
3. Paŭlo iras al la meso en la preĝejo dimanĉe matene je la deka.
4. Dimanĉe mi vekiĝas malfrue, kaj lunde frue.
5. La tuta familio ferias en la Alpoj en julio aŭ aŭgusto.
6. Ne venu malfrue. Venu frue.
7. La malsanulejo estas malfermita tage kaj nokte.
8. Ni matenmanĝas matene, tagmanĝas posttagmeze, kaj vespermanĝas vespere.

EKZERCO 14a: Sekvu la modelon, vi respondas al la demando: Kiam okazis tio?:

Kiam tio okazis? 12/29/2003 = la dudeknaŭan de decembro, dumil tri

Vidu respondojn sur la paĝo 114.

1. 1/1/2000 = _____.
2. 1/31/2000 = _____.
3. 5/1/2004 = _____.
4. 12/25/1951 = _____.
5. 10/12/1492 = _____.

Ekzerco 14b: Vidu supre sur la antaŭa paĝo. *Vidu respondojn sur la paĝo 114.*

1. La filmo estos l_____ je la oka v_____ .
 2. Mi iras al mia leciono de piano je la sepa kaj duono m_____ v_____ .
 3. Paŭlo iras al la meso en la preĝejo d_____ m_____ je la deka.
 4. Mi vekiĝas m_____ d_____ , kaj frue lunde.
 5. La tuta familio ferias en la Alpoj en j_____ aŭ a_____ .
 6. Ne venu m_____ . Venu frue.
 7. La malsanulejo estas malfermita t_____ kaj n_____ .
 8. Ni matenmanĝas m_____ , tagmanĝas p_____ , kaj vespermanĝas
v_____ .
-

BEKkurso Vortstudo 15

Sufikso -EJ

ĉevalo	kafo	loĝi	naĝi	reto
ĉevalejo	kafejo	loĝejo	naĝejo	retejo
dormi	kino	mallibera	necesa	ttt
dormejo	kinejo	malliberejo	necesejo	tttejo
duŝi	kuri	malsanulo	ofico	trinki
duŝejo	kuirejo	malsanulejo	oficejo	trinkejo
halti	lerni	manĝi	preĝi	vendi
haltejo	lernejo	manĝejo	preĝejo	vendejo

EKZERCO 15 : utiligu vortojn kun la sufikso -ejo. Vidu respondojn sur la paĝo 114.

1. Li estas ŝtelisto sed la policianoj kaptis lin. Nun li estas en la m_____.
2. Estas lunde matene. La geknaboj estas en la l_____.
3. La familianoj dormas en la domo, kaj la hundo en la h_____.
4. -- Ĉu vi deziras vidi filmon?
-- Jes, ni iru al la k_____.
5. Estas dimanĉe matene. La kristanoj iras al la diservo en la p_____.
6. La kokino estas en la forno. La forno estas en la k_____.
7. Apartamentoj kaj domoj estas l_____.
8. Ĉu vi deziras trinki kafon aŭ teon? Se jes, ni iru al la t_____.
9. Ĉu vi deziras manĝi sandviĉon kun fromaĝo kaj ŝinko? Do, ni iru al la m_____.
10. Henriko iras al la lernejo. Li atendas la buson. Li estas ĉe la h_____.
11. La patro de Henriko nun laboras. Li estas bankisto. Li estas nun en la o_____.
12. Matene mi lavas min en la d_____.
13. La pastro iris en la p_____ por la dimanĉa diservo.
14. La ambulanco alportis la viktimon de la akcidento al la m_____.
15. La instruisto kaj instruistino restas la tutan tagon en la l_____.
16. En la k_____ cent personoj spektis la filmon.
17. La t_____ de la Universala Esperanto Asocio troviĝas ĉe www.uea.org.

BEKumaĵoj II

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 114.

mal, in, ge, eg, et, il, ej

1. gelernantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = tre malgranda vilaĝo
3. _____ = filo kaj filino
4. _____ = grandega urbo
5. _____ = tute ne facila
6. _____ = Ni seĝas lignon per tio.
7. _____ = instrumento por fajfi
8. _____ = loko por trinki kafon
9. _____ = Tie estas malsanuloj.
10. _____ = Estas granda loko. Oni vendas tie.
11. _____ = Ilo por haki arbojn.
12. _____ = blovi multege
13. _____ = malgranda ilo
14. _____ = edzo kaj edzino
15. _____ = Oni voĉdonas per tio.
16. _____ = eta problemo
17. _____ = kuzo kaj kuzino
18. _____ = alta turo
19. _____ = aparato por komputi
20. _____ = la kontraŭo de longa
21. _____ = ina lernanto
22. _____ = ete varma
23. _____ = tute ne pura
24. _____ = Tie estas la tttpaĝoj de Esperanta asocio.
25. _____ = komputila aparato por printi

BEKkurso Vortstudo 16

Prefikso RE-

aŭdi	farbi	memori	skribi
reaŭdi	refarbi	rememori	reskribi
aŭskulti	iri	preni	telefoni
reaŭskulti	reiri	repreni	retelefoni
demandi	komenci	rigardi	uzi
redemandi	rekomenci	rerigardi	reuzi
dormi	konstrui	ripeti	veni
redormi	rekonstrui	reripeti	reveni
fari	legi	sendi	vidi
refari	relegi	resendi	revidi

EKZERCO 16: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 115.

1. Mi ne bone komprenis la artikolon en la matena ĵurnalo. Mi devis ___l___ ĝin.
2. En la pasinta jaro ni feriiis ĉe la plaĝo en la suda parto de Hispanio. Ĉi jare ni faros la samon. Ni ___i___ en Hispanion.
3. Mi devas foriri nun. Ni ___v___ nin morgaŭ. Ĝis la ___v___.
4. En la BEKkurso vi faras la demandoliston unufoje. Poste vi ĝin ___l___.
5. Mi tute forgesis lian nomon. Mi ne ___m___ ĝin.
6. Estas malfrue. Estas la fino de la leciono por hodiaŭ. Ni ___k___ la lecionon morgaŭ matene.
7. Por nia ferio ni iros al Grekio en julio. Ni ___v___ ĉi tien en aŭgusto.
8. Faru tion unufoje, kaj se tio ne efikos, ___f___ ĝin.
9. La muroj de nia domo estas verdetaĵ, sed al ni pli plaĉas blankaj muroj. Ni ___f___ la murojn baldaŭ.
10. Post via BEKkurso, vi povos vendi aŭ doni viajn BEKlibrojn al nova lernanto. Li povos ___u___ la librojn.
11. Mi skribis retpoŝtan mesaĝon, sed mia modemo malfunkciis. Mi devis ___s___ la mesaĝon.
12. Antonio telefonis al mi per sia poŝtelefono, kaj li donis al mi sian telefonnumeron, sed mi malbone aŭdis ĝin dufoje. Poste li devis ___r___ la numeron plian fojon!

BEKumaĵoj III

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 115.

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re

1. gelernantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = alta hundo
3. _____ = Infano ludas per tio.
4. _____ = neĝi tre malmulte
5. _____ = tre longa kaj larĝa strato
6. _____ = Oni manĝas per tio, ekzemple forko.
7. _____ = veni refoje
8. _____ = Ĉasisto havas tion. Ĝi pafas.
9. _____ = la malo de bela
10. _____ = knabo kaj knabino
11. _____ = sendi mesaĝon per komputilo duan fojon
12. _____ = Uzante tion, oni faras fosaĵon.
13. _____ = loĝejo kun malmulte da spaco
14. _____ = tre peza porko
15. _____ = ŝviti la tutan tagon
16. _____ = tre ruĝa
17. _____ = pensi pri io plian fojon
18. _____ = tute ne larĝa
19. _____ = ami amikon daŭre kaj multe
20. _____ = stari, sidi, kaj poste stari
21. _____ = loko por kuracistoj, flegistoj, kaj malsanuloj
22. _____ = kato kaj katino
23. _____ = tre, tre riĉa
24. _____ = En tiu loko oni dormas.
25. _____ = farbi la murojn de via domo duan fojon

BEKkurso Vortstudo 17

Sufikso -AĴ

<i>araneo</i>	<i>dolĉa</i>	<i>krei</i>	<i>sendi</i>
<i>aranaĵo</i>	<i>dolĉaĵo</i>	<i>kreaĵo</i>	<i>sendaĵo</i>
<i>aŭskulti</i>	<i>glacio</i>	<i>legi</i>	<i>ŝafo</i>
<i>aŭskultaĵo</i>	<i>glaciaĵo</i>	<i>legaĵo</i>	<i>ŝafaĵo</i>
<i>bovido</i>	<i>kokido</i>	<i>malfacila</i>	<i>skribi</i>
<i>bovidaĵo</i>	<i>kokidaĵo</i>	<i>malfacilaĵo</i>	<i>skribaĵo</i>
<i>bovino</i>	<i>kokino</i>	<i>manĝi</i>	<i>spamo</i>
<i>bovinaĵo</i>	<i>kokinaĵo</i>	<i>manĝaĵo</i>	<i>spamaĵo</i>
<i>bovo</i>	<i>komponi</i>	<i>nova</i>	<i>trinki</i>
<i>bovaĵo</i>	<i>komponaĵo</i>	<i>novaĵo</i>	<i>trinkaĵo</i>
<i>desegni</i>	<i>konstrui</i>	<i>pentri</i>	<i>vesti</i>
<i>desegnaĵo</i>	<i>konstruaĵo</i>	<i>pentraĵo</i>	<i>vestaĵo</i>

EKZERCO 17: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 115.

1. En lernolibroj por fremdlingvoj multfoje troviĝas l _____. La gelernantoj studas ilin.
2. En la vilaĝo estis kelkaj domoj kaj nur unu alta k _____.
3. Mi ege soifas. Mi deziras t _____.
4. Mi treege malsatas. Mi bezonas m _____.
5. Sur la kasedo por la gelernantoj de Esperanto estas sep a _____ unuflanke, kaj ok aliflanke.
6. Kaj la viando? Kion vi deziras manĝi kiel viandon? Ĉu ŝ _____, b _____, aŭ k _____?
7. Hodiaŭ en mia interreta leterkesto, mi ricevis s _____ kun unu viruso!
8. Ĉemizo, pantalono, jupo, ŝuoj, gantoj ktp estas v _____.
9. En BEKunu de la BEKkurso, vi povas vidi d _____ pri Mipi, Mupi kaj Sinjoro Nopo.
10. -- Ĉu estas multe da n _____ en la matena ĵurnalo?
-- Kiel kutime: politiko, sportoj, ekonomio kaj vetero.
11. Ĉu vi vidis la p _____ de Pablo Pikaso en la muzeo de Parizo?

12. Al mi plaĉas multe aŭskulti la k_____ de Betoveno, speciale la
simfoniojn kaj sonatojn por piano.
13. Ĉevalo vivas sur ĉevalejo. Araneo sur a_____.
14. Estas varmege hodiaŭ. Ĉu vi deziras aĉeti g_____?
15. -- Ĉu la leterportisto jam estis ĉe ni ĉi matene?
-- Jes, li lasis tri s_____ por vi. Unu el ili venis el Ĉinio.
16. Ĉokolado kaj bombonoj estas tre bonaj ekzemploj de d_____.
17. Esperanto estis origine la k_____ de Doktoro Zamenhof, okulkuracisto.
Esperanto estas relative facila lingvo. Ĝi ne havas la neregulecon kaj la
m_____ de la aliaj lingvoj.
18. En multaj islamaj landoj oni ne manĝas porkaĵojn. Ili manĝas multe da
ŝ_____.
19. En nia libro vi kelkfoje trovas d_____ de multkolora birdo kun granda beko,
la tukano. Ĝi *bekumas*. Kaj vi?
20. Multaj el la plej altaj k_____ en la tuta mondo troviĝas en Novjorko.
-

Prinotu: aĵo kiel manĝaĵo: ŝafo kaj ŝafaĵo, ovo kaj ovaĵo, bovo kaj bovaĵo, kapro kaj kapraĵo,
porko kaj porkaĵo, glacio kaj glaciaĵo, kuniklo kaj kuniklaĵo, apro kaj apraĵo, ktp

Prinotu: aĵo kiel objekto: Estas multe da aĵoj sur la tablo. Tio estas miaj aĵoj. Mi lasis miajn
aĵojn en la veturilo. Al kiu apartenas tiu aĵo? Ktp.

BEKkurso Vortstudo 18

La alfabeto = la aboco

literoj kaj (sono)

a (a)	f (fo)	j (jo)	o (o)	u (u)
b (bo)	g (go)	ĵ (ĵo)	p (po)	ŭ (ŭo)
c (co)	ĝ (ĝo)	k (ko)	r (ro)	v (vo)
ĉ (ĉo)	h (ho)	l (lo)	s (so)	z (zo)
d (do)	ĥ (ĥo)	m (mo)	ŝ (ŝo)	
e (e)	i (i)	n (no)	t (to)	

EKZERCO: prononcu la sekvajn sonojn

- | | |
|-------------------------------------|-----------------------------------|
| 1. a bari, kato, varma, a | 15. k koto, teko, bekkurso, ok |
| 2. b beni, bebo, rabi | 16. l li, fali, lulilo, al |
| 3. c celo, paco, cepoj, deca, scias | 17. m muro, nomo, mapo, mi |
| 4. ĉ ĉaro, ĉeko, aĉa | 18. n ne, pano, ni, lin |
| 5. d doni, movado, pado | 19. o oni, oro, kajto, o |
| 6. e ek, pace, peco, e | 20. p patro, tajpi, pipo, sep |
| 7. f fama, pafi, fajfi | 21. r rato, paro, rara, per |
| 8. g gepatroj, tago, giga | 22. s sapo, listo, senso, si, ses |
| 9. ĝ ĝangalo, aĝo, naĝi, ĝi | 23. ŝ ŝipo, paŝo, ŝerco, ŝi |
| 10. h hotelo, hejmo, prahistorio | 24. t tie, kato, ttt-ejo, cent |
| 11. ĥ ĥaoso, ĥoro, Don Kiĥoto | 25. u ulo, kulo, dum, u |
| 12. i ilo, piki, ĉi tie, i | 26. ŭ aŭ, laŭ, malgraŭ |
| 13. j juro, pajaco, junio, kaj | 27. v voĉo, vipo, PIV, vi |
| 14. ĵ ĵus, aĵo, ĵeti | 28. z zorgi, mezo, zigzagi |

Distingu inter la sekvaj vortoj!

rozo/roso, paŝo/paso, paco/Paŭlo, paĝo/pago, laca/laksa, aĝo/ago, aligi/aliĝi, broĉo/broso, celo/ĉelo, horo/ĥoro, pesilo/pezilo, pago/paĝo, kruĉo/kruco, deserto/dezerto, bluzo/bluso, aĵo/aĝo, ĝojo/ĵazo/ĵerzo, gaso/gazo, geno/ĝeno, akcento/akĉento, kraĉi/kraki ktp.

BEKumaĵoj IV

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 115.

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ

1. ĝelernantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = tre malgranda urbo
3. _____ => geonkloj = onklo kaj _____
4. _____ = tre granda urbo
5. _____ = tute ne granda
6. _____ = Ni tranĉas panon per tio.
7. _____ = legi alifoje
8. _____ = Ni havas kurson tie kaj lernas tie.
9. _____ = Oni trinkas tion.
10. _____ = Oni manĝas tion.
11. _____ = malgranda kato
12. _____ = pluvi multe
13. _____ = neĝi tre malmulte
14. _____ = Oni aĉetas trinkaĵojn tie.
15. _____ = manĝaĵo el bovo
16. _____ = manĝaĵo el bovino
17. _____ = patro kaj patrino
18. _____ = fari alifoje
19. _____ = Ni skribas per tio.
20. _____ = skribi denove
21. _____ = ree fari
22. _____ = la tuttera teksaĵo de la interreto
23. _____ = Ni sendas fakson per tio.
24. _____ = Artisto pentris tion, kaj ĝi estas en la muzeo.
25. _____ = Infanoj ŝatas tion, ĉar ĝi estas dolĉa.

BEKkurso Vortstudo 19

Sufikso -EBL

atingi	fidi	kompreni	nombri	trovi
atingebla	fidebla	komprenebla	nombrebla	trovebla
aŭdi	fleksi	legi	porti	utiligi
aŭdebla	fleksebla	legebla	portebla	utiligebla
elteni	forges	lerni	rekon	uzi
eltenebla	forgesebla	lernebla	rekonebla	uzebla
eviti	havi	levi	rompi	venki
evitebla	havebla	levebla	rompebla	venkebla
fari	kompari	manĝi	trinki	vidi
farebla	komperebla	manĝebla	trinkebla	videbla

Prinotu: aŭdeblaj kaj neaŭdeblaj sonoj, atingebla kaj neatingebla celoj, nefarebla tasko, netrinkebla akvo, neeltenebla doloro, neforgesebla vojaĝo, ktp

EKZERCO 19a: utiligu la supraĵn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝon 115.

1. Ne trinku la akvon el tiu fonto! Bedaŭrinde, tiu akvo ne estas t_____.
2. Mi parolas du lingvojn: nur la anglan kaj la hispanan. Por mi la Ĉina lingvo ne estas k_____.
3. Aleksandro skribas tre malbone. Liaj leteroj kaj poŝtkartoj ne estas facile l_____.
4. Ne kredu lin tro. Li ne diras la veron. Li mensogas multe. Li ne estas f_____.
5. -- Ĉu vi pensas, ke Esperanto estas facila lingvo?
-- K_____e, mi kredas, ke ĝi estas facila!
6. Joĉjo! Ne frapu tiel forte la vitron de la fenestro! Ĝi estas r_____.
7. Ĵus antaŭ la akcidento li vidis la alian veturilon, kaj li bremsis multe, sed la akcidento, bedaŭrinde estis nee_____.
8. Sen salo tiu supo estas tre malbongusta, eĉ nem_____.
9. -- Levu la tablon!
-- Mi ne povas. Ĝi estas tro peza. Ĝi ne estas l_____.
10. Mi petas: parolu pli laŭte ĉe via telefono! Vi estas apenaŭ a_____.
11. Oni ne povas vidi bakteriojn, virusojn kaj aliajn mikrobojn. Ili ne estas v_____ sen mikroskopo.
12. Dum nokto sen lumo oni povas vidi objektojn, sed oni ne scias, kio ili estas. Tiuj

objektoj ne estas r_____.

13. Cezaro, la romiano, venis kun granda, forta armeo. Li diris, ke li ne estas v_____.
 14. Por la homoj kaj la vivaj estuloj la morto ne estas, bedaŭrinde, e_____.
 15. Mi havas fortegan kapdoloron. Mi devas engluti pilolon kontraŭ la doloro, ĉar ĝi ne estas e_____.
 16. Rigidaj estas ŝtalo, fero kaj betono. F_____ estas kaŭĉuko, papero kaj maldikaj arbobranĉoj.
 17. Mi ĉiam memoras mian vojaĝon en la Alpoj. Tiuj montoj estas ege belaj, belegaj. Mi havis nef_____ vojaĝon.
 18. Miaj brunaj ŝuoj estas tro malnovaj kaj truaj. Ili ne plu estas u_____.
 19. Ĉe li estas granda komputilo, sed por vojaĝi li prenas sian p_____ komputilon kaj metas ĝin en specialan valizon.
 20. La nuna epoko estas tre malsama rilate la antaŭan. La epokoj ne estas k_____.
-

Prinotu: Eblas, ke ni iros. Eble mi faros tion. Estas eble, ke mi faros tion. Ekzistas du eblaj solvoj. Neeblaĵo, malebla, maleblaĵo, neebla, ktp.

Prinotu: Estas tri ebloj: iru norden, iru okcidenten, aŭ iru suden. Orienten ni ne povas pro la altaj montoj.

EKZERCO 19b: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj; eble, ebleco, neebla, ktp. Vidu respondojn sur la paĝo 115.

1. _____, ke ni iros al la Alpoj por niaj ferioj en la venonta jaro.
2. Ankaŭ estas _____, ke ni flugos al la suda parto de Hispanio.
3. Estas du _____: iru dekstren aŭ iru maldekstren.
4. -- Ĉu tio estas eblaĵo?
-- Tute ne! Tio estas _____.
5. Ekzistas pluraj _____ solvoj por tiu problemo.

BEKkurso Vortstudo 20 mi ŝatas, al mi plaĉas

Trinki kafon, akvon, teon, ĉokoladon, organĝsukon, bieron, ktp

Manĝi fruktojn, legomojn, viandon, multe da fragoj, ktp.

Ludi muzikan instrumenton, violonon, pianon, orgenon, gitaron, drumon, en rokgrupo

Ludi ŝakon, damojn, Skrablon, tenison, piedpilkon (futbalon), kartojn, pilkon, flugpilkon, ktp

Sporti, promeni, kuri, futbali, skii, naĝi, grimpi sur monto, ktp

Legi librojn, romanojn, librojn pri historio, pri aventuroj, sciencfikcion, ktp

Vidi filmon, spekti teatraĵon, aŭskulti muzikon, partopreni eventon, ktp

Kolekti poŝtmarkojn, monerojn, antikvajn poŝtkartojn, bildkartojn, pupojn, objektojn, ktp.

EKZERCO 20: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 115.

1. Maria estas en la kinejo nun, ĉar al ŝi plaĉas spekti f_____.
2. Elizabeta manĝas multe da pomoj, piroj kaj oranĝoj. Ŝi ŝatas f_____.
3. Ĉu al vi plaĉas la r_____ de Julio Verne? Ĉu vi scias, ke oni diras, ke li estis Esperantisto?
4. Eva atente atendas pilkon kun rakedo en la mano. L_____ t_____ plaĉas al ŝi.
5. La korpo de Johanino ne toleras kafeinon. Do k_____ ne plaĉas al ŝi.
6. Georgo estas filatelisto. K_____ p_____ al li multe plaĉas.
7. Al Barbara plaĉas multe fari vortojn. Ŝi ofte ludas S_____ kun aliaj Esperantistoj.
8. Mia amiko Mikaelo ĉiam estas en akvo. Li iras al naĝejo ĉiusemajne, ferias ĉe la marbordo, plongas en lagon, ktp. Li ŝatas _____.

Prinotu: Kafo plaĉegas al mi. Mi ŝategas kafon kun lakto kaj sukero. Tiu stulta ideo malplaĉas al mi multege. Faru laŭ via plaĉo. Faru laŭplaĉe. Tre plaĉa muziko. Malplaĉa bruoj. Mi malŝatas urban trafikon.

BEKumaĵoj V

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 115.

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl

1. gelernantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = longa rivero
3. _____ = inaj ŝafoj
4. _____ = tute ne trankvila
5. _____ => Oni ne povas vidi viruson, ĉar ĝi ne estas _____.
6. _____ = manĝaĵo el porko
7. _____ = Oni levas ion per tio.
8. _____ = maksimume laŭte
9. _____ = faksi leteron duan fojon
10. _____ = malpeza birdo
11. _____ => Ni povas fari tion. Tio estas _____.
12. _____ = Tie oni duŝas sin.
13. _____ = junulo kaj junulino
14. _____ = io nova en la unua paĝo de la ĵurnalo
15. _____ = ina kuracisto
16. _____ = aviadilo kun malmulte da spaco
17. _____ => Li ne povas porti tiun pezan sakon. Ĝi ne estas _____.
18. _____ = brili malforte kiel stelo
19. _____ = minimume paroli
20. _____ = la malo de ĝojo
21. _____ => Ne forgesu la lecionon! Ĝi estas facile _____!
22. _____ = vasta lando kiel Rusio aŭ Ĉinio
23. _____ = nur proksimume blua
24. _____ = sidi ree
25. _____ = sendi poŝtkarton plian fojon

BEKkurso Vortstudo 21

ĈI

EKZEMPLOJ 1

<i>tie</i>	<i>tie ĉi, ĉi tie</i>
<i>tio</i>	<i>tio ĉi, ĉi tio</i>
<i>tiu</i>	<i>tiu ĉi, ĉi tiu</i>
<i>tiuj</i>	<i>tiuj ĉi, ĉi tiuj</i>
<i>tiu libro</i>	<i>ĉi tiu libro, tiu ĉi libro</i>
<i>tiuj libroj</i>	<i>ĉi tiuj libroj, tiuj ĉi libroj</i>

EKZEMPLOJ 2

<i>ĉio</i>	<i>ĉio ĉi</i>
<i>lundo</i>	<i>ĉi-lunde</i>
<i>semajno</i>	<i>ĉi-semajne</i>
<i>monato</i>	<i>ĉi-monate</i>
<i>jaro</i>	<i>ĉi-jare</i>
<i>fojo</i>	<i>ĉi fojo</i>

Ekzemploj en frazoj:

1. Kio estas ĉio ĉi sur la tablo ĉi tie?
2. La lastan fojon mi faris tion, sed ĉi -foje mi ne faros tion.
3. Ĉi tiuj libroj estas miaj, kaj tiuj estas liaj.
4. Ĉi tie en mia urbo, kaj tie en la via.
5. Venu tuj ĉi tien!
6. Ne iru al la centro de la urbo! Ne iru tien. Restu ĉi tie.
7. Ĉi-jare ni ferios en la montaro. Venontjare ni iros al la plaĝo. Lastjare ni restis tie ĉi.
8. Bonvolu preni ĉi tiujn librojn ĉi tie, kaj metu ilin sur la breton tie.

EKZERCO 21: utiligu la supraĵajn vortojn, kun ĉi en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 116.

1. Lastjare ni feriis en la suda parto de nia lando, sed _____ ni iros al la norda.
2. Tiu krajono estas via, kaj _____ estas mia.
3. Tiuj paperoj estas viaj, kaj _____ estas miaj.
4. Venontmonate ni laboros, sed _____ ni ripozas ĉar estas nia ferio.
5. Ne restu tie. Venu rapide _____!
6. Kio estas _____ ĉi tie sur la tablo?
7. Tiuj libroj apartenas al vi, kaj _____ libroj kaj paperoj apartenas al mi.
8. Kiu estas tiu, kaj kiuj estas _____?

BEKkurso Vortstudeto 21b

I. urbo, urbeto, urbego, urbano, urbanino, geurbanoj *Vidu respondojn sur la paĝo 116.*

1. Pekino, Novjorko, San-Paŭlo kaj Tokio estas _____.
2. Loko iom pli granda ol vilaĝo estas _____.
3. Tiuj viroj kaj virinoj loĝas en urbo. Ili estas _____.

II. manĝi, manĝeti, manĝegi, manĝilo, manĝejo, manĝebla, remanĝi

1. Paŭla volas maldikiĝi iomete por la somero. Ŝi nun _____.
2. Tiu viando estas putra. Ĝi ne plu estas _____.
3. Tagmeze ni kutime manĝas en la _____.

III. skribi, reskribi, skribilo, skribaĵo

1. Estas multe da eraroj en la teksto, do mi _____ ĝin.
2. Ĉu vi _____ per la dekstra mano aŭ per la maldekstra?
3. Kreto, feltkrajono kaj globkrajono estas la _____ de la instruisto.

IV. juna, maljuna, junulo, maljunulo, junulino, gejunuloj, gemaljunuloj, junularo

1. Grupo da junaj personoj estas _____.
2. Mia avo kaj mia avino estas _____.
3. Juna, ina persono estas _____.

V. varma, malvarma, varmo, malvarmo, varme, malvarme, varmega, varmeta, ktp.

1. La _____ vento de la vintro.
2. La _____ aero de la somero.
3. La temperaturo estas tre, treege alta. Estas _____ al mi.

VI. bela, malbela, belulino, malbelulino, belega, ktp.

1. La princino estas _____.
2. La sorĉistino estas _____.
3. La princino estas _____o, kaj la sorĉistino estas _____o.

BEKkurso Vortstudo 22

Sufikso -AN

<i>Afriko</i>	<i>familio</i>	<i>Kristo</i>	<i>sama lando</i>
<i>Afrikanano</i>	<i>familiano</i>	<i>Kristano</i>	<i>samlاندano</i>
<i>armeo</i>	<i>Irlando</i>	<i>Madrido</i>	<i>senato</i>
<i>armeano</i>	<i>Irlandano</i>	<i>Madridano</i>	<i>senatano</i>
<i>asocio</i>	<i>Islamo</i>	<i>okcidento</i>	<i>ŝipo</i>
<i>asociano</i>	<i>Islamano</i>	<i>okcidentano</i>	<i>ŝipano</i>
<i>Budho</i>	<i>kamparo</i>	<i>polico</i>	<i>urbo</i>
<i>Budhano</i>	<i>kamparano</i>	<i>policano</i>	<i>urbano</i>
<i>eksterlando</i>	<i>klubo</i>	<i>sama domo</i>	<i>Usono</i>
<i>eksterlandano</i>	<i>klubano</i>	<i>samdomano</i>	<i>Usonano</i>
<i>estraro</i>	<i>kongreso</i>	<i>sama ideo</i>	<i>vilaĝo</i>
<i>estrarano</i>	<i>kongresano</i>	<i>samideano</i>	<i>vilaĝano</i>

EKZERCO 22: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 116.

1. Francisko havas loĝejon en Madrido. Li estas M_____.
2. La familio Medrano iras al la preĝejo dimanĉe. Ili estas K_____.
3. Estas 150 loĝantoj en tiu vilaĝo. Alivorte, tie estas 150 v_____.
4. Foje oni uzas la vorton Esperantisto, kaj foje oni uzas la vorton s_____.
5. Lincoln, Reagan kaj Clinton estas U_____.
6. Antaŭ dek jaroj Rudolfo loĝis en la kamparo. Tiam li estis k_____.
7. Nun, Rudolfo loĝas en Novjorko. Nun li estas u_____.
8. La familio de Ali iras al la moskeo. Ili estas I_____.
9. Entute, 45 personoj laboras sur la ŝipo *Bona Vento*. La ŝipo havas 45 s_____.
10. Sinjoro Jones kaj Sinjoro Smith loĝas en la sama lando. Ili estas s_____.
11. Ne estis manĝejo en tiu vilaĝo. Por tagmanĝi en restoracio la v_____ kelkfoje veturis al najbara urbo.
12. La Universala Esperanta Asocio havas milojn da a_____.
13. Dum la kongreso de Esperanto, la k_____ aŭskultis la prelegon de fama sciencisto.
14. La p_____ arestis la ŝteliston kaj metis lin en la malliberejon.

BEKumaĵoj VI

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 116.

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an

1. gelernantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = membro de klubo
3. _____ => geedzoj = edzo kaj _____
4. _____ = tre granda domo
5. _____ = tute ne peza
6. _____ = Ni abonas revuon per tio.
7. _____ = legi la duan fojon
8. _____ = estas loko por malliberaj ŝtelistoj
9. _____ => Oni ne povas trinki tion. Ĝi ne estas _____ .
10. _____ = Tio estas nova.
11. _____ => Oni povas manĝi tiun fungon, ĉar ĝi estas _____ .
12. _____ = helpi multe
13. _____ = ete pluvi
14. _____ = Oni vendas aĵojn tie.
15. _____ = manĝaĵo el porka viando
16. _____ = manĝaĵo el porkina viando
17. _____ = ripete uzi
18. _____ = fari plian fojon
19. _____ = Oni manĝas per tio.
20. _____ = forgesi denove
21. _____ = fari ree
22. _____ = viro tre sperta pri io
23. _____ => Oni povas porti tiun komputilon. Ĝi estas _____ komputilo.
24. _____ = loĝanto de Irlando
25. _____ = la programoj en komputilo

BEKkurso Vortstudo 23

Sufikso -AR

abelo	bovo	juĝisto	meblo	ŝipano
abelaro	bovaro	juĝistaro	meblaro	ŝipanaro
adreso	ĉeestanto	kampo	monto	ŝtupeto
adresaro	ĉeestantaro	kamparo	montaro	ŝtupetaro
amiko	estro	kliento	prezo	ŝtupo
amikaro	estraro	klientaro	prezaro	ŝtuparo
arbo	haro	leĝo	programo	tendo
arbaro	hararo	leĝaro	programaro	tendaro
aŭskultanto	homo	loĝanto	regulo	verko
aŭskultantaro	homaro	loĝantaro	regularo	verkaro
birdo	horo	manĝilo	ŝafo	vorto
birdaro	horaro	manĝilaro	ŝafaro	vortaro

EKZERCO 23: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 116.

1. Se vi ne konas vorton, malfermu vian v _____!
2. Post la manĝoj ni devas lavi la m _____.
3. Sur la ŝipo troviĝas la ŝipestro kaj la ŝ _____.
4. Li ne prenis la lifton, sed uzis la ŝ _____ inter la teretaĝo kaj la dua etaĝo.
5. Li estas kalva. Li ne havas h _____ sur la kapo.
6. -- Kiam alvenos kaj foriros la trajno por Parizo?
-- Mi ne scias. Atendu momenton. Mi rigardos en la libro pri la h _____ por la trajnoj.
7. Mi ne povas kroĉi la pentraĵon ĉe la muro. La hoko estas tro alta. Mi petas, alportu al mi la s _____.
8. Ĉu vi vidis la grandan b _____? Ĝi migras suden por la vintro.
9. Esperantistoj legas multe la v _____ de Zamenhof. Tiamaniere ili lernas bonan lingvan stilon.
10. La muzikisto ludis la pianon bonege dum la koncerto. Poste la ĉ _____ strariĝis kaj aplaŭdis laŭte kaj longe.
11. La prezidanto, la vicprezidanto, kaj la aliaj anoj (membroj) de la e _____ diskutis pri la novaj budĝeto kaj plano por la firmao.
12. -- Kiom kostas tiu varo?

- Mi ne scias. Atendu sekundon. Mi konsultos la p _____.
13. -- Ĉu vi loĝos en hotelo dum viaj ferioj en aŭgusto?
- Ne, ĉi-jare ni restos en t _____. Al ni plaĉas ankaŭ viziti la naturon.
14. Ĉu vi ŝatas loĝi en urbo, aŭ ĉu vi preferas la k _____?
15. La j _____ kaj la advokatoj ne kredas, ke la nova leĝo estas tre bona. Laŭ ili, ĝi ne solvos la nuntempan krimproblemon.
16. Bela tablo! Belaj seĝoj! Eleganta libroŝranko! Via m _____ estas belega!
17. Kiu estas la plej efika kontraŭspama p _____ por mia komputilo?
18. Multe da personoj aŭskultas la polan radion en Esperanto. La a _____ estas multnombra.
19. En Svislando estas la bela m _____ la Alpoj.
20. La homoj de la tuta mondo nomiĝas ankaŭ h _____.
21. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, skribis 16 regulojn por la lingvo. Hodiaŭ, oni ankoraŭ uzas tiun r _____.
22. Atentu! Ne metu vian manon en tiun truon! Tie estas abeloj. Tie estas tuta _____.
23. Li aŭdis la blekojn de bestoj de la alia flanko de la monteto, ĉar tie troviĝis ŝ _____.
24. Antaŭe, vulpoj, lupoj kaj eĉ ursoj loĝis en tiu a _____.
25. -- Kiom da personoj loĝas en tiu vilaĝo?
- Mi ne scias. Sed mi pensas, ke la l _____ estas ne tre multnombra.
-

Prinotu:

birdo, birdaro, birdeto, birdaĵo, birdego, ktp.

ŝipo, ŝipano, ŝipanaro, ŝipego, ŝipeto, ktp.

manĝi, manĝilaro, manĝilo, manĝebla, nemanĝebla, manĝejo, manĝeti, ktp.

verki, verkaro, verko, verketo, verkego, verkisto, ktp.

BEKkurso Vortstudo 24

Sufikso -IST, -ISM

<i>alkoholo</i>	<i>hararon tondi</i>	<i>labori</i>	<i>reklami</i>
<i>alkoholismo</i>	<i>hartondisto</i>	<i>laboristo</i>	<i>reklamisto</i>
<i>arto</i>	<i>Ido</i>	<i>lingvo</i>	<i>scienco</i>
<i>artista</i>	<i>Idisto</i>	<i>lingvisto</i>	<i>sciencisto</i>
<i>Budho</i>	<i>Judo</i>	<i>Markso</i>	<i>ŝteli</i>
<i>Budhismo</i>	<i>Judismo</i>	<i>Marksismo</i>	<i>ŝtelisto</i>
<i>ĉasi</i>	<i>ĵurnalo</i>	<i>maro</i>	<i>terkultivo</i>
<i>ĉasisto</i>	<i>ĵurnalisto</i>	<i>maristo</i>	<i>terkultivisto</i>
<i>dento</i>	<i>kapitalo</i>	<i>milito</i>	<i>teroro</i>
<i>dentisto</i>	<i>kapitalismo</i>	<i>militisto</i>	<i>teroristo</i>
<i>ekonomiko</i>	<i>kanibalo</i>	<i>okulo</i>	<i>traduki</i>
<i>ekonomikisto</i>	<i>kanibalismo</i>	<i>okulisto</i>	<i>tradukisto</i>
<i>esplori</i>	<i>komerco</i>	<i>patrioto</i>	<i>vegetara</i>
<i>esploristo</i>	<i>komercisto</i>	<i>patriotismo</i>	<i>vegetarismo</i>
<i>fiŝkapti</i>	<i>komuno</i>	<i>plumbo</i>	<i>vendi</i>
<i>fiŝkaptisto</i>	<i>komunismo</i>	<i>plumbismo</i>	<i>vendisto</i>
<i>flegi</i>	<i>Kristano</i>	<i>politiko</i>	<i>verki</i>
<i>flegisto</i>	<i>Kristanismo</i>	<i>politikisto</i>	<i>verkisto</i>

EKZERCO 24: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 116.

1. Se vi havas doloregon en la buŝo, kial ne viziti la d_____?
2. Li laboras sur ŝipo. Li vojaĝas ĉirkaŭ la mondo. Li estas m_____.
3. Sinjoro Bubo ne laboras, tamen li havas monon. Li kaŝe prenas la aĵojn de aliaj personoj. Li estas ŝ_____.
4. La Hispano Cervantes estis la aŭtoro de la libro Don Kiĥoto. Li estas la v_____ de la libro.
5. Ĉu vi havas kapdoloron, stomakdoloron, gorĝdoloron? Iru kaj konsultu vian k_____.
6. En la kaverno la e_____ malkovris oran kaj arĝentan trezoron kun diamantoj.
7. En la malsanulejo la kuracistoj kaj f_____ vizitas la pacientojn (malsanulojn).
8. _____ studas la historion de lingvoj, la gramatikon, kaj aliajn lingvajn aferojn.
9. Se vi bezonas okulvitrojn, mi rekomendas, ke vi iru al la o_____.
10. Ili ne manĝas viandon. Ili kredas je v_____.

11. Prezidento, senatano, kongresano estas p_____.
 12. Se via hararo estas tro longa, vi povas iri al la h_____.
 13. La artefarita lingvo Ido malsukcesis rilate Esperanton antaŭ longe. _____ estis parolantoj de tiu lingvo.
 14. Kutime la personoj en la sinagogo kredas je J_____.
 15. Ĉi tiu fakulo interesiĝas pri la ekonomikaj aferoj. Li estas e_____.
 16. En la televido vi povas vidi reklamojn por produktoj kiel sapo, lavpulvoro, ktp. R_____ faris tiujn reklamfilmojn.
 17. Sur la ponto estas personoj kun hokoj, specialaj stangoj, kaj korboj por fiŝoj. Tiuj personoj nomiĝas f_____.
 18. Dum la malvama milito estis lukto inter Usono kaj Sovetunio. Inter k_____, kaj k_____.
 19. En la kampoj de tiuj personoj estas maizo, aveno kaj tritiko. Tiuj personoj estas t_____.
 20. Bedaŭrinde bombo eksplodis proksime de la stacidomo, kaj estis 3 mortigitoj kaj pli ol 20 vunditoj. T_____ metis tiun bombon.
 21. En la aŭtuno, Sinjoro Rodrigo prenas sian pafilon, kaj li kaj liaj amikoj iras al la kamparo por trovi anasojn kaj aliajn birdojn. Ili estas ĉ_____.
 22. Ili kredas, ke Kristo estas profeto kaj la filo de Dio. Ili kredas je K_____.
 23. Tiuj personoj skribas librojn, romanojn, poemojn, ktp. Ili estas v_____.
 24. Pentristoj kaj skulptistoj kreas arton. Ili estas a_____.
 25. Doktoroj pri fiziko, biologio, ĥemio estas s_____. Ili esploras kaj malkovras.
-

Prinotu:

espero, esperi, Esperanto, Esperantisto, Esperantistino, Geesperantistoj, Esperantistaro, Esperanta literaturo, Esperantaj libroj, esperebla, espereble, malesperi, malespero, senespera, senespero, ktp.

BEKumaĵoj VII

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 116

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism

1. gelernantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = Li aŭ ŝi kuracas la malsanulojn (pacientojn).
3. _____ = Ĉi tiu persono flegas en hospitalo (malsanulejo).
4. _____ => Oni ne povas kuraci la malsanon. Ĝi ne estas k _____.
5. _____ = la malo de afabla
6. _____ = Per tiu folio oni povas mendi librojn aŭ aliajn aĵojn.
7. _____ = legi denove
8. _____ = Estas loko por malsanuloj
9. _____ => Du malsamaj katoj estas kato kaj _____.
10. _____ = Tio estas bona.
11. _____ => Oni ne povas fleksi tiun metalon, ĉar ĝi ne estas _____.
12. _____ = helpi nur iomete
13. _____ = pluvi la tutan tagon kaj nokton
14. _____ = Mi aĉetas kaj alia persono vendas en tiu loko.
15. _____ = manĝaĵo el kapra viando
16. _____ = manĝaĵo el porkina viando
17. _____ = ĉambro por dormi en domo
18. _____ = fari denove
19. _____ = Oni manĝas per tio.
20. _____ = forgesi plian fojon
21. _____ = grupo da ŝafoj
22. _____ = Ili faras sciencajn esplorojn.
23. _____ = Tiu persono profesie vendas.
24. _____ = Ŝi ludas stelan rolon en filmo.
25. _____ = Ĉi tiu aparato ventumas la motoron de via komputilo.

BEKkurso Vortstudo 25

Sufikso -ESTR

<i>asocio</i>	<i>hotelo</i>	<i>muziko</i>	<i>ŝipo</i>
<i>asociestro</i>	<i>hotelestro</i>	<i>muzikestro</i>	<i>ŝipestro</i>
<i>banko</i>	<i>klubo</i>	<i>oficejo</i>	<i>tribo</i>
<i>bankestro</i>	<i>klubestro</i>	<i>oficejestro</i>	<i>tribestro</i>
<i>firmao</i>	<i>laborejo</i>	<i>orkestro</i>	<i>urbo</i>
<i>firmaestro</i>	<i>laborejestro</i>	<i>orkestrestro</i>	<i>urbestro</i>
<i>grupo</i>	<i>lernejo</i>	<i>polico</i>	<i>vilaĝo</i>
<i>grupestro</i>	<i>lernejestro</i>	<i>policestro</i>	<i>vilaĝestro</i>

EKZERCO 25: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 117.

1. Li estas la kapitano de komerca ŝipo. Li estas la ŝ_____.
2. La p_____ parolis pri la krima problemo en la malnova kvartalo de la urbo.
3. La u_____ diris, ke la nova parko en la okcidenta parto de la urbo nomiĝos *Parko Zamenhof*.
4. “Silentu! Estu silentaj!”, kriis la o_____ al la ĉeestantaro. “Ek! Komencu la muzikon!” li diris al la orkestranoj.
5. Ĉiutage, la b_____ pensis pri la enspezoj kaj la elspezoj en kaj el la kontoj de sia banko.
6. La o_____ dungis novan sekretariinon por tajpi leterojn, sendi faksojn, kaj respondi al elektronikaj mesaĝoj.
7. La l_____ parolis kun la geinstruistoj pri la novaj infanoj en la lernejo.
8. La dormoĉambro de lia hotelo estis brua. La duŝo ne funkciis. La planko estis malpura. Estis multe da araneaĵoj sub la plafono. La littukoj estis ŝiritaj, kaj sur la kapkuseno estis morta muŝo! La kliento plendis poste al la h_____.
9. La l_____ montris la novajn taskojn kaj la ilojn al la novaj laboristoj.
10. Alia nomo por la gvidanto aŭ ĉefo de grupo estas g_____.

Prinotu: *estro, estrino, estraro, estrarano, estri, la estrino de la urbo, la estraro de la firmao, la estraro de UEA, bone aŭ malbone estri aferon, 10 estraranoj en la estraro,*

BEKumaĵoj VIII

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 117.

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr,

1. gelernantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = Li flegas malsanulojn en la malsanulejo.
3. _____ = Ĝi flegas pacientojn en la hospitalo.
4. _____ = farbi muron dek jarojn poste
5. _____ = ne venki en la batalo
6. _____ = Ili mendis tion en interreto per tiu papero.
7. _____ = iri matene, iri vespere
8. _____ = bongusta manĝaĵo el sukero
9. _____ = la ĉefo de stacidomo de trajno
10. _____ => Oni ne povas ripari la ŝuojn. Ili ne estas r_____.
11. _____ = malgranda kato
12. _____ = estro de malsanulejo
13. _____ = neĝi tri sinsekvajn tagojn sen paŭzo
14. _____ = grupo da steloj en la ĉielo kiel konstelacio, aŭ, ĉiuj steloj
15. _____ = Oni uzas tion por fosi fosaĵon.
16. _____ = Li loĝas en la sama domo.
17. _____ = generalo aŭ alia alta oficiro de la armeo
18. _____ = instruisto kaj instruistino
19. _____ => Tiu objekto ne estas peza. Ĝi estas _____.
20. _____ = memori post forgeso
21. _____ = multe da bovoj kune sur kampo
22. _____ = membro de la estraro de firmao
23. _____ = Tiu persono ludas futbalon profesie.
24. _____ = malalta konstruaĵo
25. _____ = En la interreto, oni babilas komputile en tiu loko

BEKkurso Vortstudo 26

Prefikso PRA-

<i>arbaro</i>	<i>epoko</i>	<i>komputilo</i>	<i>onklo</i>
<i>praarbaro</i>	<i>praepoko</i>	<i>prakomputilo</i>	<i>praonklo</i>
<i>avo</i>	<i>Esperanto</i>	<i>naturro</i>	<i>lingvo</i>
<i>praavo</i>	<i>praesperanto</i>	<i>pranaturro</i>	<i>pralingvo</i>
<i>avino</i>	<i>historio</i>	<i>nepo</i>	<i>tempo</i>
<i>praavino</i>	<i>prahistorio</i>	<i>pranepo</i>	<i>pratempo</i>
<i>BEK</i>	<i>homo</i>	<i>nevo</i>	<i>ulo</i>
<i>praBEK</i>	<i>prahomo</i>	<i>pranevo</i>	<i>praulo</i>

EKZERCO 26: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 117.

1. La patro de mia avo estas mia p__a_____.
2. Tio okazis antaŭ tre tre longe. Tio okazis en la p__h_____.
3. Ne estas domoj nek konstruaĵoj en la p__a_____. Estas nur sovaĝaj birdoj kaj bestoj.
4. Antaŭ miliono da jaroj, la p__h_____ vivis sur la tero.
5. La filo de mia nepo estas mia p__n_____.
6. La unua versio de Esperanto kelkfoje nomiĝas p__e_____.
7. Antaŭ nia moderna tempo kaj antaŭ nia epoko de tro da poluado de la naturo, ekzistis la p__n_____.
8. Ĉu la Neandertalaj homoj vivis en kavernoj? Ĉiaokaze, ili estis p__h_____.
9. La patrino de mia avo aŭ de mia avino estas mia p__a_____.
10. Permesu al mi, kara leganto aŭ legantino, ke mi nomu la originalan version de la BEKkurso la p__b_____. Mi faris ĝin en la Liceo de Esperanto en Madrido en 1987.

BEKumaĵoj IX

Bonvolu plenigi la spacon per la vorto kun la ĝusta prefikso aŭ sufikso. Respondoj 117.

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra

1. gelernantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ => fermi la pordon kaj poste _____ ĝin
3. _____ = la patro de mia avo aŭ de mia avino
4. _____ => princo kaj _____
5. _____ = edzo kaj edzino
6. _____ = ĉiuj junuloj
7. _____ = la direktoro de hotelo
8. _____ = arbaro antaŭ milionoj da jaroj
9. _____ = pagi al iu poste
10. _____ = En tiu loko oni kuiras.
11. _____ = Oni veturas per tio.
12. _____ = laboranto sur ŝipo
13. _____ => Oni ne povas vidi bakteriojn kaj virusojn. Ili ne estas v _____ .
14. _____ = tre antikvaj homoj
15. _____ = la unua BEKkurso en Madrido en 1987
16. _____ = tre rapida vento
17. _____ = tute ne proksime
18. _____ => aperi kaj poste _____
19. _____ => Vi ne povas rompi tiun plaston, ĉar ĝi ne estas r _____ .
20. _____ = tre mallonga rivero
21. _____ = troa trinkado aŭ drinkado de alkoholo
22. _____ = la kampoj ekster la urbo
23. _____ = la ostoj de la korpo
24. _____ => La aviadilo flugas alte, sed mi povas aŭdi ĝin. Ĝi estas _____.
25. _____ = arda deziro

BEKkurso Vortstudo 27

Prefikso MIS-

<i>adicii</i>	<i>estri</i>	<i>kompreni</i>	<i>skribi</i>
<i>misadicii</i>	<i>misestri</i>	<i>miskompreni</i>	<i>misskribi</i>
<i>akuzi</i>	<i>formi</i>	<i>legi</i>	<i>traduki</i>
<i>misakuzi</i>	<i>misformi</i>	<i>mislegi</i>	<i>mistraduki</i>
<i>aŭdi</i>	<i>gvidi</i>	<i>literumi</i>	<i>trafi</i>
<i>misauĉi</i>	<i>misgvidi</i>	<i>misliterumi</i>	<i>mistrafi</i>
<i>citi</i>	<i>interpreti</i>	<i>paŝi</i>	<i>trakti</i>
<i>misciti</i>	<i>misinterpreti</i>	<i>mispaŝi</i>	<i>mistrakti</i>
<i>direkti</i>	<i>kalkuli</i>	<i>prononci</i>	<i>uzi</i>
<i>misdirekti</i>	<i>miskalkuli</i>	<i>mispronci</i>	<i>misuzi</i>

EKZERCO 27: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 117.

1. -- Dek plus tri estas *dek kvar*.
 -- Vi eraris! Vi m__k_____.! Vi m__a_____.! Estas dek tri!
2. -- Kio estas la angla vorto por *kato*?
 -- Ĝi estas *dog*.
 -- Ne, vi eraris refoje. Vi m__t_____. La vorto *kato* signifas *cat* en la angla.
3. -- Venu tiam.
 -- Ĉu mi venu al la esperanta kunveno *morgaŭ*?
 -- Ne, vi m__k_____ min. Ne morgaŭ, sed postmorgaŭ.
4. La vorto estas *ĉu*, ne *ŝu*. Vi m__p_____ la literon ĉ.
5. Oni diras, ke la urbestro diris tion. Sed tion li ne faris. La ĵurnalo
 m__c_____ lin en la artikolo.
6. Ne briligu viajn ŝuojn per buŝtuko! Ne m__u_____ vian buŝtukon!
7. -- Ĉu vi vidis en la hodiaŭa ĵurnalo, ke estos striko en la venonta semajno?
 -- Ne estos striko en la venonta semajno, sed en ĉi tiu semajno. Vi
 m__l_____.
8. Mi skribis la vorton erare. Mi m__s_____ ĝin.
9. Johano estas iom surda. Parolu pli laŭte al li, ĉar kelkfoje li m__a_____.
10. La demagogo promesas ĉion, sed li m__g_____ la popolon ĉiam.

BEKumaĵoj X

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis
Respondoj p. 117

1. gelnantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = malgranda valo
3. _____ = prononci ĝ anstataŭ ĵ
4. _____ => ne alveni malfrue, sed _____ al nia kunveno
5. _____ = ĉiuj legantoj de revuo, ekzemple, de *Monato*
6. _____ = ina advokato
7. _____ = tiuj aparatoj servas la tutteran teksaĵon (TTT)
8. _____ => levi kaj _____ la piedon por gimnastiki
9. _____ = Tio eble povas kuraci malsanon kiel la netipan pneŭmonion (SARS).
10. _____ = ne ĝuste interpreti signifon de lingvo
11. _____ = praktiki muzikaĵon denove
12. _____ = la fama muro de Ĉinio
13. _____ = Ili ne povis eviti tiun veturilan akcidenton. Ĝi ne estis _____.
14. _____ = io el ovo por manĝi
15. _____ = la unuaj, malrapidaj, multekostaj, ne tre efikaj komputiloj
16. _____ = trakti iun malbone
17. _____ = Ĉi tiu persono instruas historion en la universitato.
18. _____ = eldona firmao por libroj
19. _____ = tre malrapida vento
20. _____ = parto de komputilo por legi kompaktaĵn diskojn.
21. _____ = Tiu sperta persono helpas vin en apoteko.
22. _____ = malgranda folio de arbo
23. _____ = ungoj de leono aŭ urso aŭ alia granda besto
24. _____ = kompreni tekston erare
25. _____ = dumviva membro de milita organizo

BEKkurso Vortstudo 28

Sufikso -ID (kompare kun -IN, -EJ, -AR kaj -AĴ)

Plenigu la subajn spacojn. Kio estas la ĝusta traduko en via lingvo? Uzu vian vortaron. Multfoje ne estas traduko, tamen ĉi tiuj ekzemploj helpas al vi pensi rekte en Esperanto. *Vidu respondojn sur la paĝo 117.*

	<i>ŝafARO</i>	<i>ŝafAĴO</i>	<i>ŝafIDO</i>	<i>ŝafEJO</i>
abelo	abelaro			
anaso				
ansero				
bovidino				
bovido		bovidaĵo		
bovino				
bovo				
ĉevalo				ĉevalejo
kapro			kaprido	
kokino				
koko				
kuniklo				
meleagro				
porko				
simio				

Prinotu: glacio kaj glaciaĵo, ovo kaj ovaĵo, hepato kaj hepataĵo, trinki kaj trinkaĵo, manĝi kaj manĝaĵo, ŝafo kaj ripo kaj ŝafripaĵo, ŝafo kaj femuro kaj ŝaffemuraĵo, ktp.

ĉevalo kaj ĉevalido, reĝo kaj reĝido, reĝino kaj reĝidino, planto kaj plantido, arbo kaj arbido, kverko kaj kverkido, Izraelo kaj izraelido (el Nova Testamento), kompare kun Israelo kaj israelanoj, ktp.

Esperanto kaj Ido (Ido venas el Esperanto).

BEKumaĵoj XI

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id Respondoj p. 117

1. gelnantoj = lernanto kaj lernantino
2. _____ = alta arbo
3. _____ = filo de reĝo
4. _____ = ludanto de violono en orkestro
5. _____ = loĝanto en la sama urbo
6. _____ = boato, luda ŝipo, aŭ malgranda ŝipo
7. _____ = fratoj kaj fratinoj
8. _____ = tute ne luma
9. _____ = ne sufiĉe bone gvidi entreprenon
10. _____ = tre juna arbo
11. _____ = kampo de maizo, kampo de tritiko, kaj aliaj kampoj ĉirkaŭ la urbo
12. _____ = ĉiuj viaj vestoj
13. _____ = tiu persono komercas por vivteni sin
14. _____ = loko en teatro por lasi vestojn
15. _____ = Birdoj kaj aviadiloj uzas ilin por flugi.
16. _____ = Li deĵoras ĉe pordo la tutan tagon.
17. _____ = tute ne hela
18. _____ = plendi multe al la estro de butikoj pri difektita varo
19. _____ = ripeti taskon duan fojon por praktiki
20. _____ = tre juna kverko
21. _____ = kompreni ion erare
22. _____ = tre juna kokino
23. _____ = ne obei la gepatrojn
24. _____ = Tio okazis.
25. _____ = speciala aparato por pumpi akvon aŭ aeron

BEKkurso Vortstudo 29

Sufikso -EC

<i>alta</i>	<i>frato</i>	<i>knabo</i>	<i>persono</i>
<i>alteco</i>	<i>frateco</i>	<i>knabeco</i>	<i>personeco</i>
<i>amiko</i>	<i>gaso</i>	<i>larĝa</i>	<i>populara</i>
<i>amikeco</i>	<i>gaseco</i>	<i>larĝeco</i>	<i>populareco</i>
<i>bela</i>	<i>granda</i>	<i>libera</i>	<i>profunda</i>
<i>beleco</i>	<i>grandeco</i>	<i>libereco</i>	<i>profundeco</i>
<i>blanka</i>	<i>grava</i>	<i>likva</i>	<i>rapida</i>
<i>blankeco</i>	<i>graveco</i>	<i>likveco</i>	<i>rapideco</i>
<i>bona</i>	<i>homo</i>	<i>longa</i>	<i>reala</i>
<i>boneco</i>	<i>homeco</i>	<i>longeco</i>	<i>realeco</i>
<i>certa</i>	<i>infano</i>	<i>malbona</i>	<i>sola</i>
<i>certeco</i>	<i>infaneco</i>	<i>malboneco</i>	<i>soleco</i>
<i>efika</i>	<i>izoli</i>	<i>membro</i>	<i>solido</i>
<i>efikeco</i>	<i>izoleco</i>	<i>membreco</i>	<i>solideco</i>
<i>egala</i>	<i>juna</i>	<i>patro</i>	<i>utila</i>
<i>egaleco</i>	<i>juneco</i>	<i>patreco</i>	<i>utileco</i>

EKZERCO 29: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 118.

1. Homoj ne preferas vivi sen aliaj personoj. Ili ne ŝatas la s_____.
2. -- Kiom granda estas la l_____, la l_____, kaj la a_____ de tiu konstruaĵo en la centro de la urbo?
-- Ĝi estas 100 metrojn larĝa, 50 metrojn longa, kaj 25 metrojn alta.
3. Bedaŭrinde, ŝia patro mortis dum ŝia i_____.
4. Junulo, profitu de via j_____, ĉar la m_____ venos rapide.
5. Mipi kaj Mupi estas bonaj amikoj. Ili havas grandan a_____.
6. Dum mia i_____, ni loĝis en la kamparo. Poste ni translokiĝis kaj ekloĝis en la urbo.
7. L_____, e_____ kaj f_____ estas la devizo de la franca Respubliko. (PIV)
8. Nuntempaj aviadiloj estas rapidaj, sed oni volas fari aviadilojn kun eĉ pli da r_____.
9. Oni povas diri kun c_____, ke $2 + 2 = 4$.

10. La prezidento parolis pri la g_____ de la situacio: granda uragano, centoj da domoj difektitaj, dek tri mortintoj, ducent vunditoj, miloj da senhemuloj. . .
 11. En ĉi tiu jaro, la pariza modo havas pli da p_____ ol la londona.
 12. Sur tiuj insuloj, milojn da kilometroj for de Azio, la viroj kaj virinoj loĝas en i_____.
 13. La b_____ de Dio, kaj la m_____ de la diablo.
 14. Oni parolas pri la bela b_____ de la blankaj klifoj de Dovero en suda Anglio.
 15. La kuracistoj atendas pli da e_____ en la novaj medikamentoj kaj kuraciloj.
 16. En la lando la p_____ de la nova kandidato kreskis rapide, ĉar li multe plaĉis al la balotantoj.
 17. Ĉu la a_____ inter rusoj kaj usonanoj daŭre kreskos en la 21a jarcento?
 18. Ekde majo 2004, Pollando, Hungario kaj ok aliajn landojn havas m_____ en la EU (Eŭropa Unio).
 19. La fizikistoj daŭre pristudas la g_____, l_____, kaj s_____ de la elementoj.
 20. Kia ŝi estas? Kia estas ŝia p_____? Ĉu amikema, parolema, timema?
-

BEKkurso Vortstudo 30

Sufikso -ER

<i>ajlo</i>	<i>frazo</i>	<i>kupro</i>	<i>mono</i>	<i>pano</i>
<i>ajlero</i>	<i>frazero</i>	<i>kuprero</i>	<i>monero</i>	<i>panero</i>
<i>akvo</i>	<i>hajlo</i>	<i>lano</i>	<i>neĝo</i>	<i>pluvo</i>
<i>akvero</i>	<i>hajlero</i>	<i>lanero</i>	<i>neĝero</i>	<i>pluvero</i>
<i>ĉeno</i>	<i>haŭto</i>	<i>ligno</i>	<i>oro</i>	<i>polvo</i>
<i>ĉenero</i>	<i>haŭtero</i>	<i>lignero</i>	<i>orero</i>	<i>polvero</i>
<i>fajro</i>	<i>kudri</i>	<i>lingvo</i>	<i>pajlo</i>	<i>roso</i>
<i>fajrero</i>	<i>kudrero</i>	<i>lingvero</i>	<i>pajlero</i>	<i>rosero</i>

EKZERCO 30: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 118.

1. Neĝas kaj la n_____ falas sur la malvarman, blankan grundon.
2. Ĉeno konsistas el multaj, malgrandaj ĉ_____ .
3. Ĉu vi aŭdas la pluvon? Ĉu vi aŭdas la p_____ fali sur la tegmenton?
4. Sur la plaĝo estas centoj da turistoj kaj milionoj da s_____ .
5. El la krano de la banĉambro venis a _____ , guton post gutu. Pro tiu brueto mi ne povis dormi! Mi devis ŝtopi miajn orelojn per vato.
6. Mi tranĉas la panon per tranĉilo, kaj etaj p_____ falas sur la tablon.
7. Mi ne povas aĉeti tason da kafo en la kafejo, ĉar mi bezonas unu eŭron, kaj en mia poŝo estas nur du malgrandaj m_____ : du k_____ .
8. Estas nekredeble, sed unu eta f_____ bruligis la tutan arbaron!
9. Fulmis, kaj tondris, kaj pluvis multege. Kun la pluvo falis grandaj h_____ . Ili detruis kvaronon de la tritiko en la kampo.
10. En la frua mateno, r_____ kovris la florojn kaj aliajn plantojn de nia ĝardeno.
11. Kiom da m_____ vi havas? Ĉu vi havas sufiĉe da ili por aĉeti botelon aŭ ladskatolon da Kokakolao?
12. Dum la vintro, la haŭto de lia kapo estas tre seka. H_____ ofte elfalis.
13. Ĉu vi volas p_____ por trinki vian limonadon?
14. La forta hakisto forte hakis la trunkon de la arbo kaj l_____ flugis ĉien.
15. Literoj, vortoj, morfemoj estas ekzemploj de l_____ .

BEKumaĵoj XII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id, ec, er, on, on Respondoj p 118

1. manĝeti = manĝi nur iomete
2. _____ = unu guto da akvo
3. _____ = En tiu ĉambro oni kuiras.
4. _____ = persono el Novjorko
5. _____ = traduki erare fremdlingvon
6. _____ = la “filo” de koko
7. _____ => $4/5$ = kvar/kvin
8. _____ => Neĝas. _____ falas.
9. _____ = veni duan fojon
10. _____ => Al mi ne plaĉas esti sola. Mi ne ŝatas _____.
11. _____ = parto de ĉeno
12. _____ => Kiel malbela vetero! Ĝi estas _____ vetero!
13. _____ = eta panpeco
14. _____ = la unuaj homoj sur la tero
15. _____ = kompreni mise
16. _____ = la ĉefa persono sur ŝipo
17. _____ = Oni informiĝas per tiu skribaĵo.
18. _____ = Ĉi tiu persono loĝas en la kamparo.
19. _____ = Prononci malbone
20. _____ => $1/1000$ = unu/mil
21. _____ = tre longa rivero
22. _____ = tre granda grupo da birdoj
23. _____ = la ĉefo de la polico en urbo
24. _____ = Liaj libroj estas sur tiuj bretoj.
25. _____ = la buŝo de leonoj kaj aliaj grandaj bestoj

BEKkurso Vortstudo 31

iom pli pri -o, -a, -e, -i

Laŭ PIV (la Plena Ilustrita Vortaro), la baza vorto por la radiko “bicikl-” estas la o-vorto “biciklo.”. Tio estas, ĝi estas substantivo. Krom o-vortoj estas ankaŭ e-vortoj (adverboj), a-vortoj (adjektivoj) kaj i-vortoj (verboj). Ĉion ĉi ni vidis en la BEKkurso, en BEKunu.

I Kvankam “biciklo” estas o-vorto, ni povas ŝanĝi ĝian kategorion kaj formi novajn vortojn. Ekzemple:

- o La knabeto havas triradan b i c i k l o n.
- a Kie mi povas aĉeti novan b i c i k l a n ĉenon?
- e Ĉu ili venis ĉi tien b i c i k l e, buse, taksie, aŭ piede?
- i Al mi plaĉas multe b i c i k l i en la parko. Morgaŭ ni b i c i k l o s en la parko.

Nun, rigardu la sekvantajn ekzemplojn:

II SAN => Laŭ PIV estas a-vorto (san/a)

- a Antaŭ du tagoj Paŭlo havis gripon, sed nun li estas tute s a n a.
- o S a n o valoras pli ol oro.
- e Vivu s a n e kaj vi sentos vin bone.
- i Lastsemajne Maria malvarmumis, sed ĉi-semajne ŝi refoje bone s a n a s.

III SALUT => Laŭ PIV estas i-vorto (salut/i)

- i Hieraŭ mi renkontis vian filon kaj li ĝentile s a l u t i s min.
- o En multaj landoj oni donas s a l u t o n per manpremo.
- a s a l u t a j vortoj, s a l u t a j gestoj
- e Li venis s a l u t e.

IV URBO (urb/o)

- o Li laboras en la u r b o, sed loĝas en la kamparo.
- a La u r b a trafiko estas tre densa hodiaŭ.
- e Li laboras u r b e, sed loĝas kampare.

V RAJTO (rajt/o)

- o La r a j t o de sindefendo
- e Li leĝe kaj r a j t e povas fari tion.
- i ĉu oni r a j t a s fumi en buso?
- a r a j t a postulo

VI VESPERO (vesper/o)

- o en la v e s p e r o, bonan vesperon
- e V e s p e r e mi restas hejme.
- a la v e s p e r a parto de la tago
- i Estas la 20a: v e s p e r a s

EKZERCO 31: metu la bonan finaĵon en ĉiun spacon. Vidu respondojn sur la paĝo 118.

1. Ni ĝuis la freŝan aeron de la maten____ promenado.
2. Maten____ mi laboris. Posttagmeze mi siestis.
3. Ĉu vi preferas la vesperon? Mi preferas la maten____.
4. Estas la oka maten____.
5. Ni havis bonan matenmanĝ____: panon, buteron, konfitaĵon, kaj kafon kun lakto.
6. Dankon pro via invit____ al la balo! Jes, mi venos kun vi.
7. Dankon pro via invit____ letero al la balo! Jes, mi akompanos vin.
8. Mi trajn____ al Parizo morgaŭ matene se eblos.
9. La busoj strikas! Mi devas iri al la centro de la urbo pied____.
10. Ĉu la busoj strikas? Do, uzu viajn pied____ por iri al la urbocentro!
11. Ili vivos multe da jaroj, ĉar ili vivas san____.
12. Ilia san____ vivo helpas al ili vivi multe da jaroj.
13. Pli gravas san____ ol multe da mono en la banko.
14. Dimanĉe ni kutime restas hejm____.
15. Ŝia hejm____ vivo estis tute trankvila.
16. Dum Viktorio laboras, Maria hejm____.
17. Ĉu la mal____ de nigra estas blanka?
18. Rigardu la sekvajn mal____ vortojn: alta/malalta, amiko/malamiko, sub/super.
19. -- Ĉu mi iru al la banko unue, kaj al la poŝtoŝeĵo poste?
-- Mal____! Iru unue al al poŝtoŝeĵo, kaj tiam la banko!
20. Tiuj plenaj sakoj da sablo estas tre pez____.
21. Tiuj plenaj sakoj da sablo pez____ multege.
22. Kiom estas la pez____ de tiuj plenaj sakoj da sablo?

BEKkurso Vortstudo 32

Sufikso -UM

aero	butono	gaso	kruco	paliso	saĝa
aerumi	butonumi	gasumi	krucumi	palisumi	saĝumi
akvo	cerbo	gusto	kvarono	palpebro	sapo
akvumi	cerbumi	gustumi	kvaronumi	palpebrumi	sapumi
aminda	dekstra	hufo	malvarma	pendi	serpento
amindumi	dekstrumi	hufumo	malvarmumi	pendumi	serpentumi
brako	du	kalkano	mano	plando	ŝtono
brakumi	duuma	kalkanumo	manumo	plandumo	ŝtonumi
buŝo	dek	kolo	nazo	plena	suno
buŝumo	dekuma	kolumo	nazumo	plenumi	sunumi
butikio	folio	kolombo	okulo	proksima	vento
butikumi	foliumi	kolombumi	okulumi	proksimume	ventumi

EKZERCO 32: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 118.

1. Sinjoro Rodrigo a_____ la rozojn kaj aliajn florojn sur la balkono ofte.
2. La sciencisto havas grandan problemon de matematiko en la kapo. Li
c_____ multe por solvi tiun problemon.
3. En kelkaj landoj oni nek manpremas nek kisas por saluti. Anstataŭ tio, oni
b_____.
4. Li surmetis la ĉemizon, kaj b_____ la butonojn.
5. En la varmaj tagoj de junio, al mi plaĉas iri al la plaĝo por s_____ min la
tutan tagon.
6. Tiu hundo estas tre danĝera, kaj ĝi mordas, do ĝi surhavas b_____.
7. Antaŭ preskaŭ du mil jaroj, la romianoj k_____ Kriston en Jerusalemo.
8. Mi ne legis tiun libron en la biblioteko. Mi nur f_____ ĝin iomete.
9. La fenestroj de la ĉambro estis fermitaj la tutan tagon. Malfermu la fenestrojn kaj
a_____ la ejon dek minutojn.
10. Mi devas aĉeti novajn ŝuojn baldaŭ, ĉar estas granda truo en la p_____.
11. Viaj manoj estas ege malpuraj. S_____ ilin ĝisfunde.
12. Estas sune hodiaŭ, sed mi ne havas miajn sunokulvitrojn. Pro tio mi p_____
multe.

13. En la salono de la koncerto estis ege varme. Pro tio, multaj aŭskultantoj v_____ la vizaĝon.
14. Lavu vian ĉemizon kaj speciale la k_____ kaj m_____, ĉar ili estas malpuraj.
15. En la lasta jarcento en la okcidenta parto de Usono, oni p_____, leĝe aŭ neleĝe, ŝtelistojn de bovoj kaj bovinoj.
16. Kvankam li c_____ dum horoj, tamen li ne solvis la problemon.
17. En la profunda valo, la rivereto s_____ ĝis la horizonto.
18. Dum la kongreso de Esperanto, ni b_____ en la urbo kaj profitis la okazon por aĉeti lokajn varojn.
19. Nia avino faras supon hodiaŭ por la festo. Ŝi g_____ la supon, metas iomete da salo, kaj reg_____ ĝin. Nun la supo havas bonegan guston.
20. La firmao ne bone p_____ la kontrakton, kaj la kliento plendis per letero.
21. Mi ne scias, kiom da personoj loĝas en tiu urbo, sed mi dirus p_____ kvin mil.
22. Maria plaĉas multe al Nikolo, kaj li a_____ ŝin.
23. Ŝiaj piedoj estis sur la malvarma planko dum la tuta mateno, kaj poste ŝi m_____.
24. La hora kaj minuta montriloj de horloĝo d_____.
25. Ni adicias, subtrahas, multobligas, kaj dividas per la d_____ nombrosistemo. Komputiloj, aliflanke, uzas la d_____ nombrosistemon.

BEKumaĵoj XIII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id, ec, er, on, um Respondoj p 118

1. _____ = dormi nur iomete
2. _____ = meti la brakojn ĉirkaŭ personon por saluti
3. _____ = la direktoro de hotelo
4. _____ = tre malrapida
5. _____ = uzi sapon kaj lavi la manojn
6. _____ = Oni manĝas tion.
7. _____ = skribi alifoje
8. _____ = skribi erare
9. _____ = Oni abonas revuon per tio.
10. _____ = 1/1000 (unu/mil)
11. _____ = Ĉi tiu persono iras al kongresoj de Esperanto.
12. _____ = grupo da ŝipoj
13. _____ = la filo de mia nepo
14. _____ = “filo” de ŝafo
15. _____ = Ĉi tiu persono loĝas en Romo.
16. _____ = Oni forviŝas la nigran tabulon per tio.
17. _____ = meti akvon sur la plantojn
18. _____ = Oni trinkas en ĉi tiu loko.
19. _____ = Oni ne povas trinki tion ĉi, ĉar ĝi ne estas _____ .
20. _____ = uzi la cerbon kaj solvi problemon
21. _____ = virina lernanto
22. _____ = prononci vorton malbone
23. _____ = Ĉi tiuj personoj instruas profesie.
24. _____ = la ŝtupoj inter la unua kaj dua etaĝo
25. _____ = iri de unu loko al alia sur la interreto

BEKkurso Vortstudo 33

Sufikso -EM

<i>agi</i>	<i>eksplodi</i>	<i>labori</i>	<i>ordo</i>	<i>scivoli</i>
<i>agema</i>	<i>eksplodema</i>	<i>laborema</i>	<i>ordema</i>	<i>scivolema</i>
<i>atenti</i>	<i>elekti</i>	<i>lerni</i>	<i>pardoni</i>	<i>senti</i>
<i>atentema</i>	<i>elektema</i>	<i>lernema</i>	<i>pardonema</i>	<i>sentema</i>
<i>babili</i>	<i>eraro</i>	<i>ludi</i>	<i>paroli</i>	<i>ŝpari</i>
<i>babilema</i>	<i>erarema</i>	<i>ludema</i>	<i>parolema</i>	<i>ŝparema</i>
<i>bruli</i>	<i>flamo</i>	<i>manĝi</i>	<i>plori</i>	<i>ŝteli</i>
<i>brulema</i>	<i>flamema</i>	<i>manĝema</i>	<i>plorema</i>	<i>ŝtelema</i>
<i>cedi</i>	<i>grumbli</i>	<i>mensogi</i>	<i>postuli</i>	<i>tikliĝi</i>
<i>cedema</i>	<i>grumblema</i>	<i>mensogema</i>	<i>postulema</i>	<i>tikliĝema</i>
<i>danki</i>	<i>helpi</i>	<i>moki</i>	<i>pura</i>	<i>timi</i>
<i>dankema</i>	<i>helpema</i>	<i>mokema</i>	<i>purema</i>	<i>timema</i>
<i>dormi</i>	<i>klaĉi</i>	<i>muziko</i>	<i>respekti</i>	<i>toleri</i>
<i>dormema</i>	<i>klaĉema</i>	<i>muzikema</i>	<i>respektema</i>	<i>tolerema</i>
<i>dubi</i>	<i>koleri</i>	<i>naski</i>	<i>ridi</i>	<i>zorgi</i>
<i>dubema</i>	<i>kolerema</i>	<i>naskema</i>	<i>ridema</i>	<i>zorgema</i>

EKZERCO 33: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 119.

1. La bebo ploras dum la tuta tago, kaj dum la tuta nokto. Ĝi estas tre p_____.
2. Johano ludas tri muzikajn instrumentojn, kaj ŝatas ĉiajn komponistojn. Li estas m_____.
3. Veraj demokratioj ne malpermesas kontraŭajn ideojn. Demokratoj devas esti t_____.
4. Ne fidu lin, ĉar li malofte diras la tutan veron. Li estas m_____.
5. Ne fumu proksime de cisternokamiono kun benzino, ĉar tiu likvo estas tre f_____.
6. Maria ŝvabras la plankon de la domo ĉiutage per ŝvabrilo, sitelo, sapo kaj akvo. Ŝi estas p_____.
7. Johano malofte aŭskultas la aliajn. Li nur malfermas la buŝon kaj eligas multe da vortoj. Li estas p_____.
8. Karlo enlitiĝas je la 9a vespere, kaj ne ellitiĝas antaŭ la 9a matene. Krome, al li plaĉas multe siesti. Karlo estas d_____.
9. Li elspezas monon nur por bezonaĵoj. Li metas multe da mono en la bankon.

- Li estas ŝ_____.
10. Kuniklo estas n_____ besteto. Ĝi havas multe da idoj tre rapide.
 11. Sinjoro Nopo koleras facile. Li estas k_____.
 12. Tiu profesoro neniam kritikas la ideojn de aliaj personoj. Li ne malakceptas fremdajn ideojn. Li estas t_____.
 13. Dinamito estas tre e_____.
 14. Nia infano volas scii kial la suno brilas, kial vulkanoj erupcias, kial la maro ondas, kial la luno rondiras la teron, kaj tiel plu. Nia infano estas tre s_____.
 15. Sinjoro Potopo ne ofte estas kontenta. Al li estas tro varme, aŭ tro malvarme. Li diras, ke la najbaroj faras tro da bruoj, kaj la supo de la edzino estas tro sala aŭ tro sensala. Sinjoro Potopo estas g_____.
 16. Miaj studentoj ĉe la universitato estas tre bonaj. Ili aŭskultas ĉion dum la leciono. Ili estas a_____.
 17. Ĉu li obstina? Tute ne! Li diras *jes* al ĉiu postulo. Li estas c_____.
 18. Johano estas inteligenta knabo, tamen li ne sufiĉe bone priatentas matematikajn ekzercojn. Li faras multe da eraroj. Johano estas e_____.
 19. Maria parolas kun la bakisto pri tio, kun la najbarino pri alio. Ŝi povas paroli la tutan tago kun ĉiuj pri ĉio. Ŝi estas b_____.
 20. Se vi tiklas min eĉ nur iomete, mi saltas kaj ridegas. Oni diras, ke mi estas t_____.
 21. Sinjoro Bobo timas mallumon, araneojn, liftojn, ĉion. Li estas t_____.
 22. Nia profesoro pri matematiko deziras nur bonegajn rezultojn. Li estas p_____.
 23. Mia filo tondas la gazonon, purigas la plankon, kaj faras aliajn taskojn por ni. Li estas h_____.
 24. Al nia juna kato plaĉas multe ludi kun fadeno. Ĝi estas l_____.
 25. Al mi plaĉas manĝi ĉion kaj ĉiam. Mi estas tre m_____.

BEKumaĵoj XIV

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id, ec, er, on, um, em Respondoj p 119

1. _____ = dormi nur iomete
2. _____ = inklina al danko
3. _____ = ĉenparto
4. _____ = personoj estas malliberaj tie
5. _____ = ĉiuj poemoj de iu aŭtoro
6. _____ = inklina al dubo
7. _____ = klarigi koncepton ankoraŭ unufoje
8. _____ = ĉiuj klientoj de komerca entrepreno
9. _____ = verŝi akvon sur plantoj
10. _____ = junuloj ĝenerale
11. _____ = En komputilo oni legas disketon per tio.
12. _____ => Petro parolas ofte kaj multe. Li estas _____ .
13. _____ = peco de ajlo
14. _____ = provi la guston de supo, ktp
15. _____ = granda pordo, ekzemple de kastelo
16. _____ => Fraŭlo ne havas edzinon, kaj _____ ne havas edzon
17. _____ = movi la palpebrojn
18. _____ = Tiu domo havas malmulte da ĉambroj.
19. _____ = bona loko por parki vian veturilon
20. _____ = kompleta listo de komputilaj adresoj
21. _____ => Mi volas dormi nun. Mi estas _____ .
22. _____ = Ŝi tradukas ĉe la Unuiĝintaj Nacioj.
23. _____ => Sinjoro Doroto dubas pri ĉio. Li estas _____ .
24. _____ = malbone trafi celon
25. _____ = ne multekosta, kontraŭe

BEKkurso Vortstudo 34

Prefikso EK-

<i>aŭdi</i>	<i>efiki</i>	<i>koni</i>	<i>loĝi</i>	<i>silenti</i>
<i>ekaŭdi</i>	<i>ekefiki</i>	<i>ekkoni</i>	<i>ekloĝi</i>	<i>eksilenti</i>
<i>boli</i>	<i>flugi</i>	<i>krii</i>	<i>ludi</i>	<i>soni</i>
<i>ekboli</i>	<i>ekflugi</i>	<i>ekkrii</i>	<i>ekludi</i>	<i>eksoni</i>
<i>brili</i>	<i>fulmi</i>	<i>kuŝi</i>	<i>plori</i>	<i>spiri</i>
<i>ekbrili</i>	<i>ekfulmi</i>	<i>ekkuŝi</i>	<i>ekplori</i>	<i>ekspiri</i>
<i>bruligi</i>	<i>i</i>	<i>labori</i>	<i>pluvi</i>	<i>stari</i>
<i>ekbruligi</i>	<i>eki</i>	<i>eklabori</i>	<i>ekpluvi</i>	<i>ekstari</i>
<i>dormi</i>	<i>kompreni</i>	<i>lerni</i>	<i>sidi</i>	<i>vidi</i>
<i>ekdormi</i>	<i>ekkompreni</i>	<i>eklerni</i>	<i>eksidi</i>	<i>ekvidi</i>

EKZERCO 34: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 119.

1. La instruisto diris al la gelernantoj aŭ “sidiĝu” aŭ “e__s_____.”
2. Oni povas diri aŭ “Mi kutime kuŝiĝas je la 10a vespere,” aŭ “Mi e__k_____ je la 10a vespere.
3. Mi e__k_____ mian amikon en la unua tago de la lernojaro en la lernejo.
4. Antaŭe Marta loĝis en Valencio, Hispanio. Poste ŝi translokiĝis kaj e__l_____ en Madrido.
5. -- Kiam vi e__l_____ Esperanton?
-- Mia unua leciono estis antaŭ dek du tagoj.
6. Subite ni e__v_____ grandan leonon kaj ni kriis, “Ni foriru tuj!”
7. Ili diris, “Ek al la laboro!” kaj “E_____ labori!”
8. Oni povas diri aŭ *komenci labori* aŭ e__l_____.
9. Mi metis la akvon sur la kuirplaton en la kuirejo, kaj kvin minutojn poste la akvo e__b_____.
10. La kuracisto preskribis medikamenton por mia kapdoloro, kaj diris, ke tiu pilolo e__e_____ post nur kelkaj minutoj.
11. La granda birdo sur la tegmento etendis la flugilojn kaj e__f_____.
12. Estis tre malhele en la kaverno, do ni e__b_____ kandelon por pli bone vidi.

BEKumaĵoj XV

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id, ec, er, on, um, em, ek Respondoj p 119

1. _____ => Tiu persono ŝatas labori. Li estas l _____.
2. _____ = komenci labori
3. _____ = Oni kudras per tio.
4. _____ = stariĝi
5. _____ => Tiu persono mensogas multe. Li estas m _____.
6. _____ = patro kaj patrino
7. _____ => Sofia agas multe. Ŝi estas _____.
8. _____ = ne kompreni koncepton
9. _____ = Birdoj flugas per tiuj du aĵoj.
10. _____ = Kristanoj preĝas en tiu loko.
11. _____ = membro de klubo
12. _____ = grupo da bovoj
13. _____ = la filo de reĝo
14. _____ = ĉefo de trinkejo
15. _____ => Oni povas fari tion. Ĝi estas _____.
16. _____ = malĝuste kopii
17. _____ = inklina je dormo
18. _____ = denove trovi
19. _____ = rapida vento
20. _____ = turni la foliojn de libro
21. _____ = fiksi la butonon en la butontruo
22. _____ = paro da amiko kaj amikino
23. _____ = la malo de varma
24. _____ = primitiva besto
25. _____ = Vi ŝaltas kaj malŝaltas elektran lumon per tio.

BEKkurso Vortstudo 35

Sufikso -AD

aŭdi	drinki	korekti	movi	ronki
aŭdado	drinkado	korektado	movado	ronkado
aŭskulti	froti	korespondi	pafi	spiri
aŭskultado	frotado	korespondado	pafado	spirado
bleki	grimp	krii	paroli	studi
blekado	grimado	kriado	parolado	studado
boji	instrui	legi	razi	tusi
bojado	instruado	legado	razado	tusado
broso	iri	lerni	resti	uzi
brosado	irado	lernado	restado	uzado
doni	kanti	martelo	ripeti	zumi
donado	kantado	martelado	ripetado	zumado

EKZERCO 35: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 119.

1. La ekzerco de l_____ estas grava. Vi lernos multajn novajn vortojn en libroj.
2. La Usonanoj pensas, ke la p_____ de la Meksikanoj estas tre rapida. Ili diras tion, ĉar Usonanoj ne scipovas la hispanan lingvon.
3. La du armeoj batalis ekster la urbo. Ni aŭdis la p_____ kaj ektimis.
4. La g_____ de la Monto Everesto estas tre danĝera, kaj daŭras multan tempon.
5. Por la bona sano de la dentoj, tre gravas b_____.
6. Lia a_____ estas tre difekta. Li aŭdas preskaŭ nenion, sed li povas pli malpli legi lipojn.
7. En la apuda salono ni aŭdis muzikon kaj k_____.
8. Mi malbone dormis hieraŭ. La b_____ de la hundo de nia najbaro ĝenis min.
9. Al multaj novaj Esperantistoj plaĉas la k_____ kun personoj el aliaj landoj
10. Prenu tiun pilolon por via t_____. Poste vi povos pli trankvile spiri.
11. Lastjare ni vojaĝis al Svislando. Ni luprenis dometon kaj nia r_____ daŭris du semajnojn.
12. Ĉu via l_____ de Esperanto rapidas? Ĉu la i_____ estas bona?

BEKumaĵoj XVI

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id, ec, er, on, um, em, ek, ad Respondoj p. 119

1. _____ => Tiu persono ŝatas labori. Li estas l _____.
2. _____ = daŭra zumo de abelo aŭ aliaj insektoj
3. _____ = Oni balaas polvon kaj malpuraĵon de la planko per tio.
4. _____ = neskribaj lingvoj antaŭ miloj da jaroj
5. _____ = kisi, atendi iomete, kisi
6. _____ = Mi gladas mian pantalonon kaj miajn ĉemizojn per tiu aparato.
7. _____ = mallonga streko kiel / (suprenstreko) aŭ – (dividostreko)
8. _____ = ade pensi
9. _____ => via supra lipo, kaj via _____ lipo
10. _____ = malbone, fuŝe legi ion
11. _____ = Tiuj personoj loĝas en la sama lando.
12. _____ = senlima timo
13. _____ = En merkato oni pesis fruktojn kaj legomojn per tio.
14. _____ = Ili partoprenas kongreson de Esperanto.
15. _____ = Ni pakis tion, kaj donis ĝin al la poŝtoŝeĵo.
16. _____ = Parto de ĉemizo ĉe la mano
17. _____ = ripeta froto
18. _____ = la estro de manĝejo
19. _____ = Vi utiligas tion por rigli pordon.
20. _____ = Ili loĝas kaj laboras en la kampero.
21. _____ = kontraŭleĝa, narkota produkto de la nigra merkato
22. _____ = ronki longe dum la nokto
23. _____ = ŝtupoj de la unua etaĝo ĝis la dua etaĝo
24. _____ => Petro koleris tre facile. Li estas _____.
25. _____ = la ago legi

BEKkurso Vortstudo 36

Vorto = (prefikso(j)) + radiko(j) + (sufikso(j)) + finaĵo(j)

	<i>PREFIKSO</i>	<i>RADIKO</i>	<i>SUFIKSO</i>	<i>FINAĴO</i>
malsanejo	mal	san	ej	o
praarbaro	pra	arb	ar	o
malfidema	mal	fid	em	a
gejunuloj	ge	jun	ul	oj
malfacilaĵo	mal	facil	aĵ	o

Ne nur prefiksoj, sed ankaŭ aliaj vortoj kaj vorteroj povas esti antaŭ la radiko. Ekzemple, oni povas meti prepoziciojn en la unua loko: *eniri*, *trairi*, *eliri*, ktp. Ofte radikoj estas kunmetitaj, ekzemple, *tekokomputilo*, *poŝkomputilo*, *telefonlibro*. Finfine multege da eblecoj ekzistas en Esperanto: *ventumilo*, *kontraŭspama*, *retpoŝtolegilo*, *ĝisdatigi*, *neeltenebla*, ktp. Esperanto estas ege riĉa lingvo, kaj poste en la BEKkurso kaj aliaj kursoj vi povos pristudi la Esperantan vortfaradon ĝisfunde.

Nun analizu la sekvantajn vortojn. Metu suprenstrekon (/) inter la eroj de la vorto. Vidu respondojn sur la paĝo 120.

- | | |
|--|---|
| <ol style="list-style-type: none"> 1. san/o 2. san/i 3. mal/san/i 4. mal/san/ul/o 5. saneco 6. malsaneco 7. saneta 8. sanega 9. malsaneta 10. malsanega 11. sanigi 12. saniga 13. malsaniga | <ol style="list-style-type: none"> 14. malsanigi 15. saniĝi 16. resaniĝi 17. malsaniĝi 18. resanigebleco 19. resanigilo 20. malsanulejo 21. malsane 22. malsanularo 23. sanularo 24. malsanulejestro 25. malsanego 26. sanas |
|--|---|

Kelkaj aliaj vortoj kun manĝ-

- | | |
|---|---|
| <ol style="list-style-type: none"> 1. manĝ/i 2. manĝ/eg/i 3. manĝeti 4. remanĝi 5. manĝilo | <ol style="list-style-type: none"> 6. manĝilaro 7. manĝebla 8. nemanĝebla 9. manĝema 10. manĝegema |
|---|---|

BEKumaĵoj XVII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id, ec, er, on, um, em, ek, ad Respondoj p. 120

1. _____ => Tiu persono ŝatas labori. Li estas l _____.
2. _____ = malgranda pordo por ĝardeno
3. _____ = Li transportas varojn per kamiono.
4. _____ = io rara
5. _____ = Pluraj bretoj. Ni metas librojn tien.
6. _____ = loko por rubo kaj balaĵoj
7. _____ = Tiu ĉi homo havas fakajn sciojn pri io.
8. _____ = Per tio oni povas teni tason.
9. _____ = ineksa urso
10. _____ = Oni akvumas florojn en la ĝardeno per tio.
11. _____ = Oni banas sin en tiu ĉambro.
12. _____ = Muzikisto metas violonon en tion por transporti ĝin.
13. _____ = Tie ni bakas kukojn, panon, viandon, ktp.
14. _____ = la fina parto de vorto en Esperanto
15. _____ = eco de io ĉarma
16. _____ = la hundoj por la ĉaso
17. _____ = trakti ion aŭ iun malbone
18. _____ = Li aŭ ŝi volonte faras ion por iu senpage.
19. _____ = Oni ĵetas pilkon tien por atingi golon en futbalo.
20. _____ = Ni ŝtopas forflutruon de bankuvo per tio.
21. _____ = loĝejo por porkoj
22. _____ = la kvalito esti egala
23. _____ = Tiuj personoj sendas multege da spammesaĝoj per interreto.
24. _____ = tereno por golfludo
25. _____ => Lastjare kelkaj firmaoj havis profiton kaj kelkaj havis _____.

BEKkurso Vortstudo 37

Adverboj

La plejparto de Esperantaj adverboj finiĝas per -e. Tamen ekzistas kelkaj aliaj adverboj, kaj tiuj ne finiĝas per -e. Tiuj adverboj estos tre utilaj por vi. Lerne ilin kiel eble plej baldaŭ, kaj uzu ilin ofte. Jen iom da adverboj por vi.

<i>almenaŭ</i>	<i>baldaŭ</i>	<i>ja</i>	<i>plu, ne plu</i>	<i>tuj</i>
<i>ankoraŭ</i>	<i>eĉ</i>	<i>jam</i>	<i>preskaŭ</i>	
<i>apenaŭ</i>	<i>for</i>	<i>ĵus</i>	<i>tro</i>	

EKZERCO 37: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 120.

1. La ebriulo estis tute ebria, ĉar li trinkis _____ da vino.
2. Petro ne estas ĉi tie nun. Li estas _____.
3. Ĉu vi finis vian hejmtaskon? Jes, mi _____ faris ĝin. Mi finis ĝin antaŭ du minutoj.
4. _____ ĉiuj sukcesis ĉe la ekzameno. Nur unu studento el cent malsukcesis.
5. -- Ĉu ankoraŭ pluvas?
-- Ne, ne _____.
6. -- Ĉu pluvas?
-- Jes, _____ pluvas.
7. Inteligentulo, studento, neintelligentulo, _____ stultulo povas solvi tian problemon.
8. Ĵus okazis akcidento, do ambulanco devas veni kiel eble plej _____.
9. Li estis tiel ebria, ke li _____ povis stari.
10. -- Kiom da ĉi tiuj piloloj mi devas engluti ĉiutage?
-- _____ ses, ne malpli.
11. La princino _____ estas vere belega!
12. -- Ĉu vi _____ studas ĉe la universitato?
-- Ne, ne plu.
13. -- Kiam li venos? -- _____, post nelonge.
14. Mi povas vidi per ĉi tiuj malbonaj okulvitroj, sed _____.
15. Ne atendu eĉ unu sekundon! Venu _____!

BEKumaĵoj XVIII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id, ec, er, on, um, em, ek, ad Respondoj p. 120

1. _____ => Tiu persono ŝatas labori. Li estas l _____.
2. _____ = Li sidas sur elefanto kaj gvidas ĝin.
3. _____ = Hartondisto uzas ĝin por tondi hararon.
4. _____ = la horoj de la aviadiloj, trajnoj, busoj, ktp.
5. _____ = flustri tre, tre mallaŭte
6. _____ = Li laboras en garaĝo kaj riparas veturilojn.
7. _____ = Ili montras la minutojn kaj horojn en horloĝo.
8. _____ = la ago spiri, enspiri kaj elspiri
9. _____ = komence senti indignon
10. _____ = gvidanto de politika partio
11. _____ = la poentoj de unu ludanto
12. _____ = neregule prononci
13. _____ = sporto kun skioj
14. _____ = la leĝoj de lando
15. _____ = oficejo pri informoj, en hotelo, en kongreso
16. _____ = malgranda kulero por kafo aŭ teo
17. _____ = longatempe aŭ ripete tremi
18. _____ = Ni utiligas tion por pumpi aeron en la pneŭojn de niaj bicikloj.
19. _____ = la “mondo” de la infanoj
20. _____ => Li disputas multe. Li estas _____.
21. _____ = Li profesie agordas pianojn kaj muzikajn instrumentojn.
22. _____ = ĉefo de unu skipo de laboristoj
23. _____ = tabelo de la prezoj en butiko, vendejo
24. _____ = io nova en ĵurnalo aŭ alia amaskomunikilo
25. _____ = malgranda kanguruo

BEKkurso Vortstudo 38

Sufikso -UJ

<i>abelo</i>	<i>citrono</i>	<i>inko</i>	<i>patrolando</i>	<i>salo</i>
<i>abelujo</i>	<i>citronujo</i>	<i>inkujo</i>	<i>patrujo</i>	<i>salujo</i>
<i>alumeto</i>	<i>Esperanto</i>	<i>kafo</i>	<i>pipro</i>	<i>sukero</i>
<i>alumetujo</i>	<i>esperantujo</i>	<i>kafujo</i>	<i>piprujo</i>	<i>sukerujo</i>
<i>bani</i>	<i>figo</i>	<i>mono</i>	<i>pomo</i>	<i>supo</i>
<i>banujo</i>	<i>figujo</i>	<i>monujo</i>	<i>pomujo</i>	<i>supujo</i>
<i>ĉerizo</i>	<i>hispano</i>	<i>papero</i>	<i>rozo</i>	<i>teo</i>
<i>ĉerizujo</i>	<i>hispanujo</i>	<i>paperujo</i>	<i>rozujo</i>	<i>teujo</i>

Prinotu:

<i>Landano</i>	<i>Lando</i>	<i>(aŭ) Lando</i>
Brito	Britio	Britujo
Ĉino	Ĉinio	Ĉinujo
Dano	Danlando	Danujo
Egipto	Egiptio	Egiptujo
Franco	Francio	Francujo
Germano	Germanio	Germanujo
Hindo	Hindio (Barato)	Hindujo
Hispano	Hispanio	Hispanujo
Italo	Italio	Italujo
Japano	Japanio	Japanujo
Ruso	Rusio	Rusujo
Svedo	Svedio	Svedujo

EKZERCO 38: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 120.

1. Rigardu la bonajn, belajn, ruĝegajn ĉerizojn en la ĉ_____! Ĉu ni manĝu?
2. Ni loĝas en apartamentoj kaj domoj. Abeloj en a_____.
3. Sur la tablo estas s_____ kaj p_____ se vi volas spici vian manĝaĵon.
4. -- Ĉu mi povas dolĉigi mian kafon?
-- Jen la s_____. Ĉu vi deziras ankaŭ lakton aŭ kremon por via kafo?
5. Madrido estas la ĉefurbo de H_____.

6. Mi metis la dekeŭran kaj dudekeŭran biletojn en mian m_____.
7. -- Ĉi tiuj ruĝaj fruktoj estas ege bongustaj!
-- Ni surgrimpu la p_____ kaj manĝu pliajn!
8. Berlino estas en G_____, kaj Stokholmo estas en S_____.
9. Kelkfoje oni parolas pri Esperantistoj kaj nomas la “mondon” de ili E_____.
10. Estas multe da dornoj en r_____. Pro tio oni diras, ke ne estas rozo sen dorno!
11. La supo estas tro sensala. Bonvolu meti iom da salo en la s_____.
12. -- Ĉu vi havas alumeton? Mi volas ekbruligi la kandelon.
-- Rigardu en la a_____ sur la breto. Eble estas kelkaj alumetoj tie.
13. Ĉu vi iam vizitis orient-aziajn landojn kiel Ĉ_____ aŭ J_____?
14. -- Ĉu vi volas tason da kafo?
-- Volonte. Vi trovos la k_____ dekstre de la fridujo.
15. Sinjoro Hans Christian Andersen, la verkisto de multe da fabeloj, estis Dano. Lia
p_____ estis Danujo.
16. Jardekojn antaŭ skribmaŝinoj, komputiloj, kaj tekstprilaboriloj kiel Vindozo, oni
uzis plumojn por skribi. Skribanto trempis la plumon en i_____ por skribi.
17. En kiu arbo oni trovas figojn? En f_____, kompreneble.
18. Post la ŝvita laboro mi volis lavi min. Mi restis multe da tempo en la b_____.
19. Ne metu vian manon en a_____! Tiuj insektoj pikos vin!
20. Por Kristnasko ŝi ricevis belan, antikvan, arĝentan t_____ de la edzo.
-

BEKumaĵoj XIX

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis,
id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj Respondoj p. 121

1. _____ => Pomoj kreskas sur _____.
2. _____ = la daŭra ago brosi
3. _____ => Anglio estas alia nomo por _____.
4. _____ = sidiĝi
5. _____ = ripete marteli
6. _____ = ofte kaj regule viziti
7. _____ => Diana parolas multe. Ŝi estas _____.
8. _____ = io bela
9. _____ = Tiu persono havas la saman ideon.
10. _____ = unu eta parto de sablo
11. _____ = Per tiu papero oni mendas.
12. _____ = mallarĝa rivero
13. _____ = En tio estas inko.
14. _____ = ujo por mono
15. _____ => Oni povas vidi tion. Ĝi estas _____.
16. _____ => Oni povas kompreni tion. Ĝi estas k _____.
17. _____ => Al li plaĉas legi multe. Li estas _____.
18. _____ => Adamo estas viro. Eva estas _____.
19. _____ = tre profunda valo
20. _____ = medikamento por kuraci
21. _____ = grego aŭ grupo da ĉevaloj
22. _____ = membro de familio
23. _____ = la kontraŭo de multekosta
24. _____ = la malo de supreniri
25. _____ = la mondo de Esperanto

BEKkurso Vortstudo 39

Sufikso -AĈ

<i>besto</i>	<i>herbo</i>	<i>odoro</i>	<i>vesto</i>
<i>bestaĉo</i>	<i>herbaĉo</i>	<i>odoraĉo</i>	<i>vestaĉo</i>
<i>ĉevalo</i>	<i>hundo</i>	<i>paroli</i>	<i>vetero</i>
<i>ĉevalaĉo</i>	<i>hundaĉo</i>	<i>parolaĉi</i>	<i>veteraĉo</i>
<i>domo</i>	<i>ĵurnalo</i>	<i>prononci</i>	<i>vino</i>
<i>domaĉo</i>	<i>ĵurnalaĉo</i>	<i>prononcaĉi</i>	<i>vinaĉo</i>
<i>drogo</i>	<i>libro</i>	<i>ŝuo</i>	<i>viro</i>
<i>drogaĉo</i>	<i>libraĉo</i>	<i>ŝuaĉo</i>	<i>viraĉo</i>

EKZERCO 39: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 121.

1. Malbona, eluzita, ĉifona vesto estas v_____.
2. Don Kihoto rajdis sur tre malbona besto. La besto nomiĝis *Rocinante* kaj ĝi estis ĉ_____.
3. Li parolas kaj li eraras multe gramatike. Li uzas fivortojn. Li malbone prononcas. Li p_____.
4. La vestoj sur miaj piedoj havas grandajn truojn malsupre. Mi surhavas ŝ_____.
5. Li bezonas farbi la domon. La domo estas malmoderna. La fenestroj de la domo estas rompitaĵoj. La domo estas malpura. Li loĝas en d_____.
6. Ne alproksimiĝu al tiu hundo. Ne tuŝu ĝin. Ĝi estas malpura. Ĝi havas pulojn ĉie sur la korpo. Ĝi estas h_____.
7. Ne kredu la artikolojn de tiu gazeto. Ĝi ĉiam havas misinformojn kaj eĉ mensogojn. Tiu gazeto estas ĵ_____.
8. Johano parolas Esperanton rapide, kaj lia gramatika nivelo ne estas alta, sed anstataŭ diri ĉ, li diras ŝ, kaj anstataŭ z li diras s. Johano p_____.
9. Tiu libro estas plena je mensogoj! Tiu l_____!
10. Pluvigis la tutan tagon. La vento blovegis. Estis malvarme. Kia v_____!
11. Kio estas tio? Malbonodora fromaĝo? Mortaj ratoj? Putraj ovoj? Kia o_____!
12. La polico arestis lin hejme. La policisto asertis, ke ĉie sur la planko estis narkotaĵoj kaj aliaj d_____.

BEKumaĵoj XX

mal, in, ge, eg, et, il, ej, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ Respondoj p. 121

1. _____ => Piroj kreskas sur _____.
2. _____ = la plej malbona vetero
3. _____ = parto de ĉemizo ĉe la kolo
4. _____ = malbela hundo kun multe da puloj
5. _____ = La buso haltas en tiu loko.
6. _____ = Ni uzas tion por fari liniojn.
7. _____ = Li pumpas benzinon en benzinejo.
8. _____ = En stacidomo, oni atendas trajnon tie.
9. _____ = granda ŝnuro por ŝipo
10. _____ = Ŝi skias multe en la montaro.
11. _____ = malgranda tapiŝo
12. _____ = Tiu ludanto ludas en la centro de la teamo.
13. _____ = Fiŝkaptisto uzas tiun aĵon por logi fiŝojn.
14. _____ = Ni povas kovri tekruĉon aŭ kaserolon per tio.
15. _____ = Ŝi kantas kaj faras kompaktn diskajn.
16. _____ = Ni ne volas tiaspecan herbon en nia ĝardeno.
17. _____ = loĝanto, civitano de Barato
18. _____ = longa, frota ago
19. _____ = tre dika haŭto de elefanto, hipopotamo, rinocero, ktp
20. _____ = ne longaj ŝtrumpoj
21. _____ = graveda virino
22. _____ = Tiu aparato suĉas polvon de sur tapiŝo.
23. _____ = forta viro
24. _____ = paŝi kaj stumbli kaj fali
25. _____ = komenci vojaĝon

BEKkurso Vortstudo 40

-ULO Sufikso

blanka	faka	kreski plene	malfeliĉa	riĉa
blankulo	fakulo	plenkreskulo	malfeliĉulo	riĉulo
blanka haro	flava	sen laboro	maljuna	saĝa
blankharulo	flavulo	senlaborulo	maljunulo	saĝulo
blinda	fremda	kvar piedoj	malriĉa	sankta
blindulo	fremdulo	kvarpiedulo	malriĉulo	sanktulo
dekstra	sen hejmo	labori	muta	surda
dekstrulo	senhejmulo	laborulo	mutulo	surdulo
ebria	juna	maldekstra	nigra	unu okulo
ebriulo	junulo	maldekstrulo	nigrulo	unuokululo

EKZERCO 40a : utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 121.

1. Tiu viro havas multe da mono en la banko. Li posedas tri domegojn. Li perlaboras multege da mono, ĉar li estas la estro de granda firmao. Li estas r_____.
2. Mia onklino aĝas naŭdek naŭ jarojn. Ŝi estas m____j_____.
3. Tiu persono trinkis du glasojn da vodko, unu botelon da vino, kaj plenan kruĉon da biero! Li estas e_____.
4. Linda skribas ĉiam per la dekstra mano. Ŝi estas d_____.
5. La plejparto de la personoj uzas la dekstran manon kutime, sed ne Petro. Li estas m____d_____.
6. Ĉevaloj, kaproj kaj cervoj havas kvar piedojn. Ili estas k_____.
7. Johano havas malbonan ŝancon. Li perdis la laborpostenon, kaj nun li ne povas trovi novan (laborpostenon). Johano estas s_____.
8. Maria ne havas monon. Ŝi ne havas eĉ sufiĉe da mono por manĝaĵoj. Maria estas m____r_____.
9. Tom estas usonano, sed nun li loĝas en Pekino. En Pekino Tom estas f_____.
10. Adamo ne estas blindulo, sed li vidas per nur la dekstra okulo. Adamo estas u_____.
11. Brajlo estas speciala skribo por la b_____. Brajlo estas speciala aranĝo de elstaraj punktoj. La b_____ tuŝas tiujn punktojn kaj legas.
12. Antaŭ multaj jaroj ni aŭdis kaj legis pri la problemoj inter la b_____ kaj la

n_____ en Sud-Afriko.

13. Li estas tute ne saĝa. Li estas m___s_____.

14. Estas du personoj sur la benko. La unua ne povas paroli. Li estas m_____. La alia ne povas aŭdi. Li estas s_____.

15. Estas du ĉefaj partioj en nia parlamento: la d_____, kaj la m___d_____.

16. Tiu filmo ne estas bona por infanoj. Ĝi estas por p_____.

17. Lastsemajne la fabriko de nia urbo dungis lin. Li ne plu estas s_____.

18. En la Kongreso de Esperanto estas personoj de ĉiaj aĝoj. Ĉeestis j_____, kaj m___j_____.

19. Ni vizitis la katedralon en Parizo, kaj tie ni vidis statuojn de Jesuo kaj de s_____.

20. Li loĝas, bedaŭrinde, sur la strato. Li estas s_____.

21. La profesoro montris kaj klarigis videokasedon pri malproksima galaksio. Li estas granda f_____ pri tiu temo.

Prinotu: granda persono, granda ulo, samaĝa, samaĝulo, senharulo, sendentulo, sencerbulo, dikventrulo, longkolulo, lamulo, fama persono, famulo, famulino, uloj kaj ulinoj, juna ulo, etulo, sennacia persono, sennaciulo, stelulino, justulo, kontraŭulo, kunulo, antaŭulo, posteulo, tieulo, tiamulo, apudulo, subulo, superulo ktp.

EKZERCO 40b : utiligu vortojn de supre. Vidu respondojn sur la paĝo 121.

1. Persono kiu lamas estas _____.

2. Personoj kiuj vivis antaŭ tre longe estas niaj _____.

3. Viro kiu havas elstaran ventron estas _____.

4. Aktorino kiu furoris en filmo nomiĝas _____.

5. Infanoj aŭ plenkreskuloj kiuj havas pli malpli la saman aĝon estas _____.

6. Viroj kaj virinoj, aŭ u_____ kaj u_____.

BEKumaĵoj XXI

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul Respondoj p. 121

1. _____ = Tiu persono estas ĉiam ebria.
2. _____ = aĉa vetero
3. _____ = juna persono
4. _____ = kuŝiĝi
5. _____ = maljuna viro
6. _____ = maljuna virino
7. _____ => Sofia babilas multege. Ŝi estas _____ .
8. _____ = io malbela
9. _____ = Li estas membro de la Akademio de Esperanto.
10. _____ = refoje forĝesis
11. _____ = Tiu persono verkas multe da libroj.
12. _____ = tre malpeza ŝtono
13. _____ = tre juna hundo
14. _____ = sangoguto
15. _____ = Oni ŝlosas pordon per tio.
16. _____ = bela ina persono
17. _____ => Ŝi ŝatas labori multe. Ŝi estas _____ .
18. _____ = tre malbona libro
19. _____ = la stato kaj kvalito esti patro
20. _____ = Oni pentras tion.
21. _____ = la homoj
22. _____ = Li aŭ ŝi havas la saman socian klason.
23. _____ = La busoj haltas tie.
24. _____ => ŝlosi kaj _____ per ŝlosilo
25. _____ = akvoguto

BEKkurso Vortstudo 41

Sufikso -IND

<i>ami</i>	<i>foti</i>	<i>manĝi</i>	<i>ridi</i>
<i>aminda</i>	<i>fotinda</i>	<i>manĝinda</i>	<i>ridinda</i>
<i>aplaŭdi</i>	<i>helpi</i>	<i>memori</i>	<i>rigardi</i>
<i>aplaŭdinda</i>	<i>helpinda</i>	<i>memorinda</i>	<i>rigardinda</i>
<i>aŭskulti</i>	<i>kolekti</i>	<i>mencii</i>	<i>riproĉi</i>
<i>aŭskultinda</i>	<i>kolektinda</i>	<i>menciinda</i>	<i>riproĉinda</i>
<i>bedaŭri</i>	<i>kompati</i>	<i>miri</i>	<i>skribi</i>
<i>bedaŭrinda</i>	<i>kompatinda</i>	<i>mirinda</i>	<i>skribinda</i>
<i>diri</i>	<i>kondamni</i>	<i>pardon</i>	<i>studi</i>
<i>dirinda</i>	<i>kondamninda</i>	<i>pardoninda</i>	<i>studinda</i>
<i>fari</i>	<i>kredi</i>	<i>pentri</i>	<i>trinki</i>
<i>farinda</i>	<i>kredinda</i>	<i>pentrinda</i>	<i>trinkinda</i>
<i>fidi</i>	<i>kritiki</i>	<i>pridiskuti</i>	<i>vidi</i>
<i>fidinda</i>	<i>kritikinda</i>	<i>pridiskutinda</i>	<i>vidinda</i>
<i>forĵeti</i>	<i>legi</i>	<i>puni</i>	<i>viziti</i>
<i>forĵetinda</i>	<i>leginda</i>	<i>puninda</i>	<i>vizitinda</i>

EKZERCO 41: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 121.

1. Bongusta suko estas t_____.
2. Muzeo kun belaj pentraĵoj estas v_____.
3. Interesa filmo estas r_____.
4. Krimulo estas p_____.
5. Tiu persono ĉiam diras la veron. Li estas f_____.
6. Tiu persono ĉiam mensogas. Li estas m____f_____.
7. Sukcesa teatraĵo estas a_____.
8. Bona ŝerco estas r_____.
9. Frandaĵo estas m_____.
10. Tiu okazaĵo forte impresis min. Ĝi estas m_____.
11. Bone verkita romano aŭ novelo estas l_____.
12. Niaj gefiloj kaj gepatroj estas a_____.
13. La morto de proksimulo estas b_____.
14. Tiu malfeliĉulo havas problemojn. Li estas k_____.
15. Rubo estas f_____.

16. Maloftaj, raraj moneroj kaj poŝtmarkoj estas k_____.
17. Li perdis la monon, la domon kaj la edzinon. Lia situacio estas k_____.
18. Li ŝtelis la monon de la banko, kaj murdis la bankiston. Tio ne estas p_____!
- Ŝtelo kaj murdo estas p_____.
19. La nova verko de la fama verkisto estas vere interesa kaj l_____.
20. Tre bela pejzaĝo! Vere p_____.
21. La tago de naskiĝo, kaj la tago de geedziĝo estas m_____.
22. Al la sciencisto plaĉas multe studi tiun temon. Al li tiu temo estas s_____.
23. La stelulino de la kinejo estas ege bela. Ŝi estas f_____.
24. La nova kanzono de la kantistino estas tre bona. Ĝi estas a_____.
-

BEKumaĵoj XXII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra,
mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind

Respondoj p. 122

1. _____ = Tiuj personoj estas malriĉaj.
2. _____ = Fiŝoj, delfenoj kaj balenoj uzas ilin por naĝi.
3. _____ = mallonga tigo de pomo
4. _____ = lavi ĝisfunde
5. _____ = meti la brakojn ĉirkaŭ amikon aŭ amikinon
6. _____ = Tio faras truon en papero.
7. _____ = Tiu persono havas multe da kuraĝo.
8. _____ = peceto el ligno
9. _____ = la parto de ŝuo proksime de la plando de nia piedo
10. _____ = tute ne obei
11. _____ = senti tre fortan koleron
12. _____ = preskaŭ fali
13. _____ = ne plu aboni revuon, ĉesigi abonon
14. _____ = antaŭhistoria besto
15. _____ = grupo de ĉeloj por abeloj
16. _____ = plado aŭ vazo por fruktoj
17. _____ => frue matene, _____ vespere
18. _____ = mallonga pantalono
19. _____ = Ni metas ilin en la orelojn por aŭskulti muzikon.
20. _____ = Ŝi skribas programojn por komputiloj.
21. _____ = Ili profesie praktikas sporton.
22. _____ = Ni ŝovelas neĝon, sablon, ktp per tiu ilo.
23. _____ = tute ne grava
24. _____ = tre densa nebulo
25. _____ = Oni tatuas tion sur la haŭto.

BEKkurso Vortstudo 42

ĉie, ĉiam, ĉio, ĉiu, ktp.

En la BEKkurso vi jam lernis uzi la tabelvortojn: kio, tio, io, nenio, kie, tie, ie, nenie, ktp. Nun vi faras ekzercon specialan por la ĉ-vortoj de la tabelo.

EKZERCO 42: utiligu la supraĵajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 122.

1. Vi povas aĉeti tiun varon en ĉiovendejoj, en bazaroj, en superbazaroj, en magazenoj, en butikoj, en tre malgrandaj vendejoj, kaj eĉ en kioskoj kaj kafejoj! Vi povas aĉeti ĝin _____.
2. Tiu vendejo estas malfermita matene, posttagmeze, vespere, kaj eĉ nokte. Vi povas aĉeti tie _____.
3. Estas ses membroj en la estraro de nia asocio. Ses el ili estas ĉi tie nun. _____ estas ĉi tie. Ni povas komenci la kunvenon.
4. -- Ĉu vi havas la valizojn, la pasportojn, la aviadilbiletojn kaj la monon?
-- Ne zorgu. Mi kunportas _____ por nia vojaĝo.
5. Akvo, akvo _____ sed ne eĉ unu guto por trinki!
6. Ĉi tie en la dezerto la suno brilas 99 procentojn el la tuta tempo. La suno brilas preskaŭ _____.
7. Mi estas dekstrulo. Mi _____ skribas dekstramane.
8. Dum la kongresoj de Esperanto _____ penas paroli Esperanton, eĉ la komencantoj.

BEKumaĵoj XXIII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra,
mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind

Respondoj p 122

1. _____ = La sukero estas sur la tablo en la _____.
2. _____ = aĉaj knaboj
3. _____ = dika persono
4. _____ = stariĝi
5. _____ = malgranda taso
6. _____ => _____ enhavas salon
7. _____ = Diana ridas multe. Ŝi estas _____.
8. _____ = Komponisto komponas tion.
9. _____ = Ni aprobu la proponon de li. Ĝi estas _____.
10. _____ = aŭskulti kanzonon duan fojon
11. _____ = Ni kompatu la _____ katon!
12. _____ = tre longa ekzameno
13. _____ = tre juna kato
14. _____ = larmoguto
15. _____ = Armita soldato luktas per tio.
16. _____ = Alia nomo por Francio.
17. _____ => La vetero ŝanĝiĝas multe. Ĝi estas _____.
18. _____ = tre malbongusta supo
19. _____ = Tiu persono estas honesta.
20. _____ = Oni konstruas tion.
21. _____ = la bestoj
22. _____ => Tiu konduto meritas riproĉon. Ĝi estas _____.
23. _____ = paroli longatempe
24. _____ = gvidanto de flughaveno
25. _____ = erara kompreno

BEKkurso Vortstudo 43

Prefikso DIS-

<i>blovi</i>	<i>flugi</i>	<i>meti</i>	<i>rompi</i>	<i>tranĉi</i>
<i>disblovi</i>	<i>disflugi</i>	<i>dismeti</i>	<i>disrompi</i>	<i>distranĉi</i>
<i>dividi</i>	<i>haki</i>	<i>munti</i>	<i>semi</i>	<i>vasta</i>
<i>disdividi</i>	<i>dishaki</i>	<i>dismunti</i>	<i>dissemi</i>	<i>disvastiĝi</i>
<i>doni</i>	<i>ĵeti</i>	<i>pecigi</i>	<i>sendi</i>	<i>volvi</i>
<i>disdoni</i>	<i>disĵeti</i>	<i>dispecigi</i>	<i>dissendi</i>	<i>disvolvi</i>
<i>fali</i>	<i>konigi</i>	<i>peli</i>	<i>ŝiri</i>	<i>volviĝi</i>
<i>disfali</i>	<i>diskonigi</i>	<i>dispeli</i>	<i>disŝiri</i>	<i>disvolviĝi</i>

EKZERCO 43: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 122.

1. Ĉe la komenco de la leciono, la instruisto d__d__ la ekzamenetojn al ĉiuj lernantoj kaj lernantinoj.
2. La bebo d__ĵ__ la ludilojn kaj pupojn ĉien en la ĉambro.
3. La komizoj devas scii d__v__ , elmeti, kaj mezuri la ŝtofon (PIV).
4. La lupoj kuris al la centro de la ŝafaro. La lupoj d__p__ la ŝafojn. Ili kuris ĉien.
5. La fortega vento de la ŝtormo d__b__ la foliojn for de niaj arboj.
6. Mi d__t__ la pomojn, kaj poste donis la pecojn al la infanoj.
7. La birdoj sur la kampo ekaŭdis la laŭtajn pafojn de la ĉasistoj, kaj ili tuj d__f__ .
8. La ekonomioj de Rusio kaj Ĉinio rapide d__v__ dum la naŭdekaj jaroj kaj poste.
9. Neniu loĝis en tiu domo dum jardekoj, kaj iom post iom ĝi d__f__ .
10. La aglo atakis kaj kaptis la kuniklon. Tuj poste la aglo d__ŝ__ la besteton per la beko kaj manĝis ĝin.
11. La forta tertremo d__r__ la brikajn murojn ĉirkaŭ la malnova vilaĝo.
12. La spamisto d__s__ milionojn da mesaĝoj kun viruso.
13. Pola Radio d__k__ novaĵojn en Esperanto ĉiutage dum 30 minutoj.
14. La novaĵoj pri la katastrofa tertremo rapide d__v__ .

BEKumaĵoj XXIV

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis Respondoj p. 122

1. _____ = Ŝi profesie interpretas lingvojn.
2. _____ = membro de parlamento
3. _____ = La prezoj de la akcioj de la borso kreskas kaj _____.
4. _____ = verda politikisto
5. _____ = io el kotono
6. _____ = stato de io aŭ iu matura
7. _____ = Oni krampas {agrafas} paperon kun krampetoj (agrafoj) per tio.
8. _____ = Inventisto kreis tion.
9. _____ = adresloko en la interreto, ekzemple www.uea.org (Univ. E-a Asocio)
10. _____ = Ŝi vendas biletojn malantaŭ giceto en stacidomo.
11. _____ = tre juna ansero
12. _____ = Ni bedaŭras lian morton. Lia forpaso estas _____.
13. _____ = Tiu persono estas surda kaj ne aŭdas.
14. _____ = konigi al ĉiuj ĉirkaŭe
15. _____ = Vi hejtas vian ĉambron per tio.
16. _____ = Ni nutras nin per tio.
17. _____ = estro de grupo, politika, socia, komerca
18. _____ = inklina al karesado
19. _____ = membro de la Akademio de Esperanto
20. _____ = glata parto de objekto
21. _____ = ĵeti tien kaj reen kaj ĉien
22. _____ = Vi tenas hakilon, martelon, kaserolon, karbon, tason ktp per tio.
23. _____ = Oni eniras tra tiu loko.
24. _____ = Oni eliras tra tiu loko.
25. _____ = blovi ion suden, norden, okcidenten kaj orienten – unuvorte: ĉien

BEKkurso Vortstudo 44

Sufikso -ING

<i>cigaredo</i>	<i>glavo</i>	<i>krajono</i>	<i>muzelo</i>	<i>plumo</i>
<i>cigaredingo</i>	<i>glavingo</i>	<i>krajoningo</i>	<i>muzelingo</i>	<i>plumingo</i>
<i>cigaro</i>	<i>kandelo</i>	<i>lampo</i>	<i>piedo</i>	<i>ŝraŭbo</i>
<i>cigaringo</i>	<i>kandelingo</i>	<i>lampingo</i>	<i>piedingo</i>	<i>ŝraŭbingo</i>

EKZERCO 44: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 122.

1. Rikardo ne tenas cigaredon en la mano. Anstataŭ tio, li uzas c_____.
2. Ne metu la kandelon sur la teleron por la kukoj! Utiligu k_____.
3. Li eksidis sur la ĉevalo, kaj metis la piedojn en la p_____.
4. Ŝi skribis du leterojn, kaj poste metis la plumon en la p_____.
5. La mezepoka soldato ne mortis pro malkuraĝo. Li mortis ĉar li ne povis eligi la glavon el la _____!
6. Metu la ŝ_____ sur la ŝraŭbon, kaj turnu ĝin.
7. Li ne desegnas nun per krajono. Lia krajono estas en la k_____.
8. Li metis la cigaron en c_____, kaj ekbruligis ĝin.

BEKumaĵoj XXV

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra,
mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing

Respondoj p. 122

1. _____ = Tie oni eldonas librojn.
2. _____ = Tiu homo faras negocojn.
3. _____ => Stevardo kaj _____ laboras en aviadiloj.
4. _____ = En kamparo oni plugas grundon per tio.
5. _____ = kunvenejo de klubo
6. _____ = akra doloro
7. _____ = mallonga kanto
8. _____ => En preĝejo ili metis la kandelojn en _____ .
9. _____ = Ĉi tiu specialisto studas lingvojn.
10. _____ = diri la literojn, laŭvice, de unu vorto
11. _____ = Oni remas en boato per ili.
12. _____ = tre laŭte plori
13. _____ = biciklanto tintas per tio.
14. _____ = Ŝi skribas literaturajn verkojn.
15. _____ = Tio okazis.
16. _____ = fraŭloj kaj fraŭlinoj
17. _____ = listo da demandoj
18. _____ = Oni metas glavon en tion.
19. _____ = insiste peti
20. _____ = tomatoplanto
21. _____ => Rudolfo forĝesis pasvorton trifoje ĉi-semajne! Li estas _____.
22. _____ = valora objekto
23. _____ = Ĉi tiu aviadilo glisas.
24. _____ = Oni ne povas mendi tiun varon tie. Ĝi ne estas _____ tie.
25. _____ = reguloj de Eŭropa Unio

BEKkurso Vortstudo 45

Sufikso -END

<i>aldoni</i>	<i>kompletigi</i>	<i>pagi</i>	<i>skribi</i>
<i>aldonenda</i>	<i>kompletigenda</i>	<i>pagenda</i>	<i>skribenda</i>
<i>apliki</i>	<i>memori</i>	<i>respondi</i>	<i>tajpi</i>
<i>aplikenda</i>	<i>memorenda</i>	<i>respondenda</i>	<i>tajpenda</i>
<i>fari</i>	<i>mencii</i>	<i>ripari</i>	<i>traduki</i>
<i>farenda</i>	<i>mencienda</i>	<i>riparenda</i>	<i>tradukenda</i>

EKZERCO 45: utiligu la supraĵn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 122.

1. Vi devas fari tion antaŭ oktobro. Alivorte, ĝi estas f_____ antaŭ oktobro.
2. -- Ĉu mi devas tajpi tiujn leterojn?
-- Jes, ili estas t_____.
3. La luprezto de la apartamento estas p_____ en la unua semajno de la monato.
4. La profesoro diras al la gestudentoj, ke tiu matematika koncepto estas m_____.
Ĝi estos en la fina ekzameno.
5. La dek ses reguloj de Esperanto estas a_____. Vi devas uzi ilin por la gramatiko de Esperanto.
6. La ventumilo de mia komputilo ne plu funkcias. Ĝi estas r_____.
7. Mi devas aldoni, alivorte, a_____, ke la sufikso *-end* ne estas oftaĵo en Esperantujo.
8. En la BEKkurso kaj en nia Vortstuda Libro, la ekzercoj estas k_____.
9. En la ekzameno de la profesoro, estis kvin demandoj. La gestudentoj devis respondi al kvar el ili. Tio estas, kvar demandoj estis r_____.
10. Kiam la fakturo estos p_____? Ĉu la dekkvaran aŭ la dekkvinan?

BEKumaĵoj XXVI

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra,
mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end
Respondoj p. 123

1. _____ => -- Bonvolu doni al mi la oleon. -- Jen la _____.
2. _____ = malbonega vetero
3. _____ = malfeliĉa persono
4. _____ => Oni devas pagi la fakturon. Ĝi estas _____.
5. _____ = lago kun malmulte da akvo
6. _____ = aĵo por fiksi kandelon
7. _____ => Ramono malŝategas labori. Li estas _____ persono.
8. _____ = Skulptisto skulptis tion.
9. _____ => Ĉiuj amas Marian. Ŝi estas _____.
10. _____ => Ni devas fari tion. Ĝi estas _____.
11. _____ = ĵeti la foliojn ĉien
12. _____ = Oni metas glavon en tion.
13. _____ = tre juna leono
14. _____ = neĝofloko
15. _____ => Oni devas respondi tiun leteron. Ĝi estas _____.
16. _____ => La piro falis sur la grundon el la _____.
17. _____ => La instruistino donis la paperojn al ĉiuj. Ŝi _____ ilin.
18. _____ = malbonodora ovo
19. _____ = Tiu persono estas freneza.
20. _____ = daŭre pluvi
21. _____ = la patrino de mia avino
22. _____ = Li laboras en apoteko.
23. _____ => Frato kaj fratino estas _____.
24. _____ => Oni povas anstataŭigi tion. Ĝi estas _____.
25. _____ => Vi povas elŝuti radio-elsendojn en E-o. Ili estas _____.

BEKkurso Vortstudo 46

Prefikso BO-

<i>avino</i>	<i>filino</i>	<i>gefratoj</i>	<i>kuzo</i>	<i>parenc</i>
<i>boavino</i>	<i>bofilino</i>	<i>bogefratoj</i>	<i>bokuzo</i>	<i>boparenc</i>
<i>avo</i>	<i>fratino</i>	<i>gepatroj</i>	<i>nevo</i>	<i>patrino</i>
<i>boavo</i>	<i>bofratino</i>	<i>bogepatroj</i>	<i>bonevo</i>	<i>bopatrino</i>
<i>familiano</i>	<i>frato</i>	<i>kuzino</i>	<i>onklo</i>	<i>patro</i>
<i>bofamiliano</i>	<i>bofrato</i>	<i>bokuzino</i>	<i>boonklo</i>	<i>bopatro</i>

EKZERCO 46: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 123.

1. La gepatroj de mia edzino estas miaj b_____.
2. La frato de mia edzino estas mia b_____.
3. La patrino de mia edzino estas mia b_____.
4. Patrino, edzino familiano por mi estas b_____.
5. Sinjoro Pilko estas la onklo de ŝia edzo. Li estas ŝia b_____.

BEKumaĵoj XXVII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end,

bo Respondoj p. 123

1. _____ = longa kolo de ĝirafa
2. _____ = kesteto por abeloj
3. _____ = Li bakas panon kaj kukojn kaj vendas ilin.
4. _____ = kajereto de ĉekoj
5. _____ = En tiu arbo troviĝas daktiloj
6. _____ = fakulo pri fiziko
7. _____ = Ni faras fajron en tiu parto de la kameno.
8. _____ => Nia teamo venkis, kaj ilia teamo _____ .
9. _____ = Tiu persono estas senhejma.
10. _____ => Ili celas idealojn. Ili havas _____ .
11. _____ = skatolo por juveloj
12. _____ = ladskatolo por kafo
13. _____ => Al ŝi plaĉas labori. Ŝi estas _____ .
14. _____ = maĉi ion duan fojon kiel bovoj, kameloj, ktp.
15. _____ = membro de la sama nacio
16. _____ = odori ege malbone
17. _____ => Lia amiko ne estas pacienca, sed, kontraŭe, _____ .
18. _____ = la radikoj de arbo
19. _____ = Ili ricevas monatan salajron.
20. _____ = Li akompanas ŝafojn tra la kamparo.
21. _____ = tablo kun mallongaj kruroj
22. _____ = io unika
23. _____ = Tiuj vagonoj iras sur relox.
24. _____ = Li ludas saksofonon en muzikgrupo.
25. _____ = la patro de mia edzino

BEKkurso Vortstudo 47

Prefikso EKS-

<i>amiko</i>	<i>generalo</i>	<i>kutima</i>	<i>reĝino</i>
<i>eksamiko</i>	<i>eksgeneralo</i>	<i>ekskutima</i>	<i>eksreĝino</i>
<i>edziĝi</i>	<i>hundo</i>	<i>membro</i>	<i>reĝo</i>
<i>eksedziĝi</i>	<i>ekshundo</i>	<i>eksmembro</i>	<i>eksreĝo</i>
<i>edzino</i>	<i>kapitano</i>	<i>moda</i>	<i>sportisto</i>
<i>eksedzino</i>	<i>ekskapitano</i>	<i>eksmoda</i>	<i>ekssportisto</i>
<i>edzo</i>	<i>kato</i>	<i>prezidento</i>	<i>urbestro</i>
<i>eksedzo</i>	<i>ekskato</i>	<i>eksprezidento</i>	<i>eksurbestro</i>

EKZERCO 47: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. Vidu respondojn sur la paĝo 123.

1. Bill Clinton estas e__p_____ de Usono.
2. La hundo havis operacion. Nun ĝi ne plu povas havi idojn. Ĝi estas e__h_____.
3. Paŭlo ne plu estas la edzo de Maria. Li e__e_____ (divorcis) antaŭ kelkaj monatoj.
4. Nuntempe longaj juĵoj estas modaj. La mallongaj juĵoj estas nun e__m_____.
5. Pro longa malsano, la reĝo abdikis. Nun li estas la e__r_____.
6. Paŭlo ege koleris kontraŭ Ramono. Paŭlo ne plu estas la amiko de Ramono. Ili estas e__a_____.
7. Antaŭe generalo, kaj nun e__g_____.
8. Roberto estis tre bona sportisto, sed subite li decidis ne plu ludi. Li iĝis e__s_____.
9. Maria estis tre aktiva membro de nia klubo de Esperanto. Poste ŝi ne plu estis membro, sed e__m_____.
10. Marta, la urbestro de nia urbo, perdis en la lasta balotado. Marta nun estas la e__u_____, sed ŝi diras, ke ŝi estos kandidatino en la venonta balotado.

BEKumaĵoj XXVIII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end, bo, eks Respondoj p. 123

1. _____ = papero por aboni revuon
2. _____ = Ŝi gardas muzeon.
3. _____ = _____ ĵurnalon antaŭ legado, kaj faldi ĝin post legado
4. _____ = tute ne ĝoja
5. _____ = manĝaĵo el hepato
6. _____ = malutila, ĝena herbo en nia ĝardeno
7. _____ = Ni heredas tion de, ekzemple, nia avo aŭ nia patro
8. _____ = kantanto en ĥoro
9. _____ => Ŝi havas multe da imagipovo. Ŝi estas _____.
10. _____ = Li kolektas impostojn.
11. _____ = Ni balotas per tiu papero.
12. _____ = ĵazmuzikisto
13. _____ = Li perdis la hararon, kaj nun estas kalva.
14. _____ = membro de kartelo
15. _____ = Tie oni kaŝas ion.
16. _____ = tute ne klara
17. _____ = la klientoj de nia firmao
18. _____ = laĉi miajn ŝuojn matene, kaj _____ ilin vespere
19. _____ = manĝaĵo el lango de bovo
20. _____ = Ni uzas tion por skani tekstojn, paperojn, ktp.
21. _____ = sankta persono
22. _____ = froti ion per sapo
23. _____ = En tiu loko estas saŭnoj.
24. _____ = Kaj lakso kaj _____ estas problemoj de nia intestaro.
25. _____ = Oni ne povas fari tion. Tio ne estas _____.

BEKkurso Vortstudo 48

Prepozicioj:

al	ĉe	ekster	je	malgraŭ	pri	sur
anstataŭ	ĉirkaŭ	el	kontraŭ	per	pro	tra
antaŭ	da	en	krom	por	sen	trans
malantaŭ	de	ĝis	kun	post	sub	
apud	dum	inter	laŭ	preter	super	

EKZERCO 46: utiligu la suprajn vortojn en la spacoj. *Vidu respondojn sur la paĝo 123.*

1. La salujo kaj piprujo estas _____ la tablo.
2. La tero rondiras _____ la suno.
3. Tiu vendejo estas malfermita _____ lundo _____ sabato.
4. Mi metis du pecojn _____ sukero _____ mian kafon.
5. Venuso estas la planedo _____ Merkuro kaj Tero.
6. Maria Helena trinkas teon _____ sukero. Li ŝatas dolĉecon.
7. Suzana trinkas teon _____ sukero. Al ŝi ne plaĉas dolĉaj trinkaĵoj.
8. Ni trinku! Jen la botelo _____ limonado.
9. Estis ege varme. _____ ni la suno fajre briladis.
10. Ĵurnaloj, revuoj, kaj libroj estas _____ papero.
11. Mi legis _____ la deka _____ la dekdua, do du horojn entute.
12. Superhomo luktadis _____ la malbonuloj.
13. La birdo flugis _____ la kaĝo kaj forflugis. Poste ni ne trovis ĝin.
14. Jen, du leteroj _____ vi.
15. _____ la pluvega vetero, la infanoj ludis la tutan tempon en la domo.
16. Dorotea skribas leterojn _____ malnova skribmaŝino, ne _____ komputilo.
17. Estas bele hodiaŭ. Mi manĝos _____ la domo _____ la arboj. Se pluvos, ni metos ĉion en la domon.
18. -- Kie estas la stacidomo?
-- Iru _____ la parkon, kaj poste sekvu la straton Zamenhof. Tie vi trovos ĝin.
19. La prelego estos _____ la Esperanto-movado kaj Zamenhof.

20. Nia profesoro estis malsana hieraŭ. _____ li, alia profesoro instruis nin.
21. Mi dankas vin. Dankon _____ via helpo.
22. Viaj okuloj, kompreneble, troviĝas _____ via buŝo.
23. Vi estas freneza! Kial vi verŝis kafon en la glason _____ vino? _____ tiuj glasoj, uzu la tasojn!
24. Ni kutime dormas _____ la nokto.
25. _____ la riparado de la pordo, vi bezonas martelon, segilon, fajlilon, kaj ŝraŭb(turn)ilon.
26. Bonvolu tuj sendi tiujn leterojn _____ la firmao en Novjorko. Estas urĝe.
27. Mi aŭdis la voĉon de persono _____ la pordo, sed mi ne rekonis ĝin.
28. En la kafejo estis kvar personoj _____ la tablo. Ili ludis kartojn.
29. Antonio estas dekstre de la tablo. Katarina estas maldekstre. Ili ambaŭ estas _____ la tablo.
30. La generalo Julio Cezaro batalis _____ la malamikoj de Romo antaŭ du jarmiloj.
31. Ĉi-sabate mi ne iros al la kinejo. Mi restos _____ mi. Mi restos hejme.
32. Kiel malbona lernanto, tiu Pablo! Li dormis _____ la tuta leciono!
33. _____ la leciono, la gelernantoj stariĝis kaj eliris _____ la klasĉambro.
34. _____ la leciono ili atente aŭskultis la profesoron. Ĉiuj aŭskultis la vortojn de la profesoro.
35. Kelnero, bonvolu alporti al mi salaton _____ vinagro kaj oliva oleo.
36. Oni manĝas supon _____ kulero.
37. Tiu monero estas _____ bronzo. Ĝi estas malaltvalora. Tiuj moneroj, aliflanke, estas el oro kaj arĝento. Ili estas altvaloraj.
38. -- _____ mi, ni devas baloti por nova urbesto. Ĉu vi samopinias?
-- Ne, male. La nuntempa urbestro estas bonega. Krome, li estas mia kuzo!
39. Estas la noktomezo. Mi eniras _____ la liton. Estas la sepa matene. Mi eliras _____ la lito.
40. -- Ĉu vi havas multe _____ mono en la tirkesto?
-- Ne, nur kelkajn monerojn.
41. _____ la domo estis varmeco, heleco kaj amikeco. _____ la domo estis malvarmeco, malheleco, forta vento kaj pluvego.

42. Vi povas manĝi ĉion en nia arbaro _____ ĉi tiuj fungoj. Atentu! Ili estas venenaj!
43. La kuracisto diris, ke mi pezas tro. Do nun _____ deserto mi manĝos frukton _____ dolĉaĵoj.
44. _____ la pluvado, ni promenis iomete en la parko.
45. Ni feriis en Francio en la montaro, kaj tie _____ la landlimo ni povis vidi la Alpojn de Svisio. Kiel belaj ili aspektas!
46. Ne karesu katon _____ la haroj. (Z)(PIV)
47. Li pasis _____ mi sen saluto. (Z)(PIV)
48. La kuglo iris _____ la fenestro kaj penetris en la supran parton de la muro. Tie la polico ĝin trovis. Tamen, ili trovis nek la pafilon nek la pafinton.
49. Li surhavas dikan trikotaĵon _____ la suno kaj la varmega temperaturo.
50. _____ la fenestro mi vidis mian amikon ĉe la alia flanko de la strato.
51. _____ la nigraj nuboj mi kunportis mian pluvombreton.
52. Vi bezonas bonegan vortaron, PIV, _____ la lernado de vortoj. Eĉ pli bonaj estas la nova vortaro de SAT nomata NPIV.

BEKumaĵoj – RESTUDO-- pri afiksoj XXIX

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end, bo, eks Respondoj p. 123

1. _____ = manĝi malmulte
2. _____ = tre granda birdo
3. _____ = tute ne bela
4. _____ = Oni trinkas bieron en tiu loko.
5. _____ = la “filino” de ĉevalo
6. _____ = grupo da ŝafoj
7. _____ = tute malbona libro
8. _____ = la antaŭa reĝo
9. _____ = (rilate min) la patrino de mia edzino
10. _____ = komence koni
11. _____ = malgranda libro
12. _____ = la kvalito esti blanka
13. _____ = Ĉi tiu persono estas ofte ebria.
14. _____ = guto da pluvo
15. _____ = aŭdi ion malbone kaj erare
16. _____ = membro de klubo de Esperanto
17. _____ = nepo kaj nepino
18. _____ = la gepatroj de miaj geavoj
19. _____ => On ne povas trinki tion, ĉar ĝi ne estas _____.
20. _____ = La unua politikisto de la urbo
21. _____ = Pentristo pentris tion.
22. _____ = diri ion alifoje
23. _____ = Oni forviŝas la nigran tabulon per tio.
24. _____ = rigardi iomete la foliojn de libro
25. _____ = veni duan fojon

BEKumaĵoj – RESTUDO-- pri Afiksoj XXX

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end, bo, eks Respondoj p. 124

1. _____ = trinki malmulte
2. _____ = tre granda hundo
3. _____ = tute ne granda
4. _____ = Oni manĝas en ĉi tiu loko
5. _____ = la “filino” de kato
6. _____ = grupo da bovoj
7. _____ = tute malbona romano
8. _____ = la antaŭa urbestro
9. _____ = (rilate min) la frato de mia edzino
10. _____ = komence dormi
11. _____ = malgranda vilaĝo
12. _____ = la kvalito esti facila
13. _____ = Ĉi tiu persono estas surda.
14. _____ = guto da akvo
15. _____ = kompreni tion malbone kaj erare
16. _____ = loĝanto en kampero
17. _____ = avo kaj avino
18. _____ = la gepatroj de miaj geavoj
19. _____ => Oni ne povas legi tion, ĉar ĝi ne estas _____.
20. _____ = La unua politikisto de vilaĝo
21. _____ = Skulptisto skulptis tion.
22. _____ = vidi ion refoje
23. _____ = Oni batas muŝojn per tio.
24. _____ = inklina al komunikado kun aliaj homoj
25. _____ = Ni printas per tio.

BEKumaĵoj – RESTUDO-- pri afiksoj XXXI

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end, bo, eks Respondoj p. 124

1. _____ = manĝi ĉion!
2. _____ = verki tre malbonajn librojn
3. _____ = io malbela
4. _____ = ege necesa
5. _____ = krii tre laŭte
6. _____ = rapide fermi kaj malfermi la palpebrojn
7. _____ = la gefratoj de mia edzino
8. _____ = ne plu instruisto
9. _____ = la malo de sukcesi
10. _____ = primitiva tempo
11. _____ = inda ja bedaŭro
12. _____ => Oni devas sekvi tiun regulon. Ĝi estas _____.
13. _____ => Oni povas anstataŭ(ig)i tion. Ĝi estas _____.
14. _____ => Tiu hundo mordas multe. Ĝi estas _____.
15. _____ = Alia nomo por Italio
16. _____ = Ŝi faras artaĵojn profesie.
17. _____ = Oni metas cigaron en tion.
18. _____ = Johano estas viro. Maria estas _____.
19. _____ = Oni faras liniojn per tio.
20. _____ = ĉefo de polico
21. _____ = ero da greno
22. _____ = stalo por ĉevalo
23. _____ = longa listo da nomoj
24. _____ = loĝanto de insulo
25. _____ = interreta loko kun adreso

BEKumaĵoj – RESTUDO-- pri afiksoj XXXII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end, bo, eks Respondoj p. 124

1. _____ = kvalito de io utila
2. _____ = stato de fianĉino
3. _____ = io malglata
4. _____ = longa, kontinua dormo
5. _____ = prahistoria arbaro
6. _____ = ne supre, sed _____
7. _____ = kursanino kaj kursano
8. _____ = Tiu reĝo abdikis.
9. _____ = malbonodora parfumo
10. _____ = iomete bela
11. _____ = freneza persono
12. _____ = ŝuoj kun truoj
13. _____ = tre alta kaj larĝa pordo
14. _____ = returne pagi ŝuldon
15. _____ = fuŝe traduki
16. _____ = komence soni
17. _____ = vastigi ĉien
18. _____ = Tio meritas kredon. Ĝi estas _____.
19. _____ = altaj montoj
20. _____ = Oni devas lerni tiun lecionon. Ĝi estas _____.
21. _____ = Ramono helpas ĉiujn. Li estas _____.
22. _____ = Sofia observas tre bone ĉion. Ŝi estas _____.
23. _____ = Oni ne povas penetri tiun lokon. Ĝi ne estas _____.
24. _____ = Sur tiu planto kreskas rozoj.
25. _____ = Ni parolas ĉe tiu parto de telefono.

BEKumaĵoj – RESTUDO-- pri afiksoj XXXIII

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end, bo, eks Respondoj p. 124

1. _____ = altaj arboj
2. _____ = malbona, malnova, riparenda veturilo
3. _____ = la gazetoj
4. _____ = io aktuala
5. _____ = gvidanto de ŝtato
6. _____ = tiu ministro de la registaro demisiis
7. _____ = la tuto de la branĉoj de unu arbo
8. _____ => En la matĉo de futbalo, Madrido venkis, kaj Barcelono _____.
9. _____ = Ŝi havas oran medalon de la Olimpiaj Ludoj
10. _____ = Fraŭlino el Hispanio
11. _____ = Tio kovras libron.
12. _____ = la maldekstrulaj membroj de parlamento
13. _____ => Oni citas tiujn vortojn. Tio estas _____.
14. _____ = personoj, civitanoj, el fremda lando
15. _____ = Ili retumas multe
16. _____ = Unu parto de la tagordo por kunsido
17. _____ = konstruaĵo por kongreso
18. _____ = antikvaj mebloj, vazoj, pentraĵoj, ktp.
19. _____ = tage heleco, nokte _____
20. _____ = Oni aŭdas kaj spektas operon en tiu loko.
21. _____ = la kvalito esti inteligenta
22. _____ = Li riparas serurojn por via pordo, ktp.
23. _____ = streĉi la krurojn aŭ brakojn iomete
24. _____ = Ni celas per tiu parto de pafilo
25. _____ = Tie konsulo donas pasporton, vizon, ktp al vi.

BEKumaĵoj – RESTUDO-- pri Afiksoj XXXIV

mal, in, ge, eg, et, il, ej, on, re, aĵ, ebl, an, ar, ist, ism, estr, pra, mis, id, ec, er, on, um, em, ek, ad, uj, aĉ, ul, ind, dis, ing, end, bo, eks Respondoj p. 124

1. _____ = la leĝoj de iu lando
2. _____ = faristo de kolbasoj
3. _____ = utiligi la interreton
4. _____ = malbonedukita, malbonkondata popolo
5. _____ = io el ledo por teni biletojn
6. _____ = loĝanto en kaverno
7. _____ = denove baki
8. _____ = manko de lumo
9. _____ = stulta ulo
10. _____ = inda je rimarkoj
11. _____ = Li estas kontraŭ ni.
12. _____ = persono apud ni
13. _____ = ĝemi profunde
14. _____ = tre granda plezuro
15. _____ = gvidanto de polico en urbo
16. _____ = aparato por kapti kuniklon aŭ alia besto
